

300 kant-poemoj de Yuan-dinastio en Esperanto

世译元曲 300 首

elĉinigis

Vejdo kaj Minosun

bitigita de Elerno

marto 2020

译者语

散曲是元代文学园地中的一朵奇葩，在中国古代文学里是有别于诗词的一种文学样式。与传统的诗词相比，它具有很鲜明的艺术特征，如用韵灵活自由，虽然与词一样需要一韵到底，但在平仄的要求上不如词韵那么严格，而且韵脚可以重复；根据表情达意的需要，可以加衬字，甚至增加句子，因而大大增加了声调和句式的自由度；以大量的口语方言入曲，通俗易懂，丰富了表现技巧。这样，散曲就具有了丰富的表现力和新的生命力。“元曲继承和发展了唐诗和宋词‘兴观群怨’的优秀传统：在意美方面，使诗歌更大众化；在音美方面，使韵律更自由化；在形美方面，使格式更多样化了。因此，元曲把诗歌进一步推向通俗化、口语化、灵活化，为近现代的白话文学开辟了道路，可以说是中国新文化运动的先声。”（许渊冲）

但对于世译中国古典的诗词曲赋却是一道难题。因为世界语与中文在用字和表达方式上存在着很大的差异，而且中国古典诗词中的对仗、对偶、平仄等在世界语中完全缺失，所以，世界语的译文只能说是原诗意境、意象等的再现，按照世界语诗歌的表达形式，能用好节奏、韵脚，读起来有世界语诗歌的诗味就算是不错的译诗，但要做到面面俱到，又不啻是给译者带上脚镣手铐动弹不得，进而让译诗顾此失彼，无法充分表达出原诗的神韵来。

翻译元曲和翻译宋词的基本原则应该差不多，除了那些中国古诗词必备的元素外，两者的最大区别是用语上的区别，元曲大量使用口语方言，而世界语基本无笔头语和口头语之分，所以在世界语的表达上只能尽量使用简单的词，避免生涩的词以示区别，当然仅仅这一点也是完全不够的。

在翻译中，我们参考了翻译宋词的一些原则。这些原则如下：

1. 完全突破过去译诗的 1:2 的传统，按原诗意思（意境）的需要来用世界语表达；
2. 世界语诗行采用长短句，但一定要有统一的节奏，如扬抑、抑扬、抑扬抑等；
3. 用韵，原诗是通押的，翻译时尽量通押，也可以换韵，原则是不以韵害意；
4. 世界语诗行可以多于原诗的诗行。

依照这些原则来翻译，也仅仅是一种探索。虽然有点筚路蓝缕，我们也原意尝试，毕竟还是需要有人在前面开路吧。应该说我们搞出的这些试验品还存在不少缺陷和质量问题。我们原意和盘托出，接受大家的批评和指正。

（除译诗注明作者的外，其余的均为本人拙译）

译者 Vejdo
2020. 3. 30

目 录 (Enhavo)

元好问

小圣乐·骤雨打新荷 (1-2) (8)

人月圆·卜居外家东园 (1-2) (8)

杨果

小桃红·采莲女 (1-2) (9)

刘秉忠

干荷叶 (1-3) (10)

杜仁杰

耍孩儿·庄家不识勾阑 (1-8) (11)

王和卿

一半儿·题情 (1-3) (14)

盍西村

小桃红·江岸水灯 (15)

小桃红·客船晚烟 (15)

小桃红·杂咏 (16)

商挺

潘妃曲 (16)

胡祇遹

沉醉东风·渔樵 (17)

伯颜

喜春来 (17)

王恽

平湖乐·尧庙秋社 (17)

卢挚

节节高 (18)

沉醉东风 (1-3) (18)

蟾宫曲 (1-2) (19)

殿前欢 (20)

寿阳曲·夜忆 (20)

蟾宫曲·沙三伴哥来啖 (21)

寿阳曲·别珠帘秀 (22)

陈草庵

山坡羊·叹世 (22)

关汉卿

白鹤子 (1-4) (23)

四块玉·别情 (23)

四块玉·闲适 (1-4) (24)

沉醉东风·送别 (25)

大德歌 (25)

大德歌 (1-4) (26)

碧玉箫 (1-2) (27)

一枝花 (1-4) (28)

白朴	
寄生草·饮	(30)
阳春曲·题情(1-6)	(31)
天净沙(1-4)	(32)
沉醉东风·渔夫	(33)
姚燧	
醉高歌·感怀	(34)
凭阑人·寄征衣	(34)
阳春曲	(34)
庾天锡	
雁儿落过得胜令(1-2)	(35)
刘敏中	
黑漆弩·村居遣兴	(35)
马致远	
天净沙·秋思	(36)
寿阳曲·潇湘夜雨	(36)
夜行船(1-7)	(36)
四块玉·恬退	(39)
四块玉·叹世(1-3)	(39)
赵孟頫	
后庭花·秋思	(40)
王实甫	
十二月过尧民歌·别情(1-2)	(41)
邓玉宾	
叨叨令·道情	(42)
阿利西瑛	
殿前欢·懒云窝	(42)
冯子振	
鹦鹉曲·山亭逸兴	(43)
鹦鹉曲·别意	(43)
朱帘秀	
寿阳曲·答卢疏斋	(44)
贯云石	
塞鸿秋·代人作	(44)
寿阳曲·新秋至	(44)
红绣鞋	(45)
蟾宫曲·送春	(45)
清江引·咏梅(1-4)	(45)
张养浩	
得胜令·四月一日春雨	(47)
朝天曲	(47)
山坡羊·潼关怀古	(47)
水仙子	(48)
水仙子·咏江南	(48)

白贲	
鸚鵡曲	(49)
郑光祖	
蟾宫曲·梦中作	(49)
蟾宫曲(1-2)	(50)
曾瑞	
闺中闻杜鹃(1-3)	(50)
集贤宾(1-6)	(51)
睢景臣	
哨遍(1-8)	(54)
周文质	
叨叨令·悲秋	(56)
落梅风	(57)
寨儿令	(57)
乔吉	
清江引·有感	(57)
清江引·即景	(58)
山坡羊·冬日写怀(1-3)	(58)
卖花声·悟世	(59)
凭阑人(1-3)	(59)
折桂令(1-4)	(60)
满庭芳·渔父词(1-2)	(62)
殿前欢·登江山第一楼	(63)
折桂令·寄远	(63)
水仙子·寻梅	(64)
水仙子·为友人作	(64)
雁儿落过得胜令·忆别(1-2)	(64)
集贤宾(1-4)	(65)
刘时中	
殿前欢	(67)
阿鲁威	
落梅风	(67)
王元鼎	
醉太平·寒食	(67)
薛昂夫	
塞鸿秋	(68)
送春(1-2)	(68)
吴弘道	
金字经(1-2)	(69)
拨不断·闲乐(1-2)	(70)
赵善庆	
折桂令·湖山堂	(70)
沉醉东风·秋日湘阴道中	(71)
庆东原·泊罗阳驿	(71)

冯谦斋

柳营曲·太平即事 (72)

张可久

人月圆·山中书事 (72)

人月圆·春晚次韵 (73)

人月圆·春日湖上 (73)

醉太平·怀古 (74)

醉太平·感怀 (74)

锦橙梅 (74)

迎仙客·秋夜 (75)

红绣鞋·宁元帅席上 (75)

红绣鞋·虎丘道士 (76)

梧叶儿·湖山夜景 (76)

梧叶儿·有所思 (76)

折桂令·西陵送别 (77)

折桂令·九日 (77)

折桂令·次韵 (78)

折桂令·村庵即事 (78)

水仙子·梅边即事 (79)

小桃红·离情 (79)

普天乐·西湖即事 (80)

普天乐·秋怀 (80)

喜春来·金华客舍 (81)

喜春来·永康驿中 (81)

朝天子·闺情 (81)

山坡羊·闺思 (82)

殿前欢·离思 (82)

清江引·秋怀 (83)

天净沙·鲁卿庵中 (83)

凭栏人·江夜 (83)

一枝花·湖上归 (1-3) (84)

徐再思

普天乐·垂虹夜月 (85)

喜春来·皇亭晚泊 (85)

蟾宫曲·江淹寺 (86)

蟾宫曲·春情 (87)

水仙子·夜雨 (87)

水仙子·春情 (87)

人月圆·甘露怀古 (88)

朝天子·西湖 (88)

查德卿

一半儿·春妆 (89)

柳营曲·金陵故址 (89)

唐毅夫

一枝花 (1-3)	(90)
朱庭玉	
天净沙·秋	(91)
张鸣善	
普天乐·咏世	(91)
落梅风·咏雪	(92)
普天乐·愁怀	(92)
普天乐·嘲西席	(92)
杨朝英	
水仙子·西湖探梅	(93)
宋方壶	
山坡羊·道情	(93)
清江引·托咏	(94)
斗鹤鹑·送别 (1-6)	(94)
贾固	
寄金莺儿	(96)
周德清	
塞鸿秋·浔阳即景	(97)
满庭芳·看岳王传	(97)
折桂令	(98)
班惟志	
一枝花·秋夜闻筝 (1-3)	(98)
汪元亨	
醉太平·警世	(100)
朝天子·归隐	(100)
沉醉东风·归田	(100)
倪瓒	
人月圆	(101)
小桃红·秋江	(101)
凭阑人·赠吴国良	(102)
水仙子	(102)
刘庭信	
折桂令·忆别	(102)
水仙子·相思	(103)
一枝花·春日送别	(104)
汤式	
小梁州·九日渡江 (1-2)	(104)
天引香·忆维扬	(105)
兰楚芳	
四块玉·风情 (1-2)	(106)
钟嗣成	
醉太平·落魄 (1-2)	(106)
钱霖	
哨遍·看钱奴 (1-12)	(107)

孙周卿	
蟾宫曲·山居自乐	(111)
曹德	
庆东原·江头即事	(112)
真氏	
解三醒	(112)
吴西逸	
天净沙·闲题	(112)
清江引·秋居	(113)
寿阳曲·四时	(113)
程景初	
醉太平	(114)
无名氏	
水仙子（1-3）	(114)
塞鸿秋	(115)
塞鸿秋·山行警	(115)
梧叶儿·嘲谎人	(115)
朝天子·志感	(116)
红绣鞋·赠妓	(116)
小桃红·别忆	(116)
折桂令·微雪	(117)
折桂令	(117)
梧叶儿·贪	(118)
四换头（1-2）	(118)
快活三过朝天子四换头（1-3）	(119)

元好问 (1190-1257)

小圣乐

骤雨打新荷

1. 绿叶阴浓，遍池亭水阁，偏趁凉多。海榴初绽，朵朵簇红罗。乳燕雏莺弄语，有高柳鸣蝉相和。骤雨过，珍珠乱撒，打遍新荷。
2. 人生百年有几，念良辰美景，休放虚过。穷通前定，何用苦张罗。命友邀宾玩赏，对芳尊浅酌低歌。且酩酊，任他两轮日月，来往如梭。

Yuan Haowen (1190-1257)

Drasta pluvo frapas novajn lotusojn

—laŭ melodio *Minora sankta muziko*

1.

Folioj verdaj ĵetas densan ombron,
vidiĝas pavilonoj sur la lago,
ĉi tie regas friska la aero.
La granatuj' ekfloras kun aromatako,
en la prosper' de flora ruĝo.
Hirund' kaj ĝiaj idoj flugas kun leĝera grako,
cikadoj laŭte ĉirpas sur salikoj altaj.
Dum drasta pluvo
pluvperloj ja disverŝas en ĥaos' per frapo
sur novajn la lotusfoliojn kun bat-krako.

2.

La homa vivo daŭras efemere.
Ne lasu bonan tempon
kaj belan pejzaĝon forflugi ŝtele!
Malbona sorto nia estas destinita
jam en antaŭa vivo vere,
ne penu per plenforto vane.
Plibone kantu ĉagrenpele
kaj drinku ĝoje kun amikoj
ĝis ebriiĝo jen prefere.
Ignoru kiel lun' kaj sun' alternas
navede kaj libere.

人月圆

卜居外家东园

1. 重冈已隔红尘断，村落更年丰。移居要就，窗中远岫，舍后长松。十年种木，一年种谷，都付儿童。老夫惟有，醒来明月，醉后清风。
2. 玄都观里桃千树，花落水空流。凭君莫问：清泾浊渭，去马来牛。谢公扶病，羊昙挥涕，一醉都休。古今几度，生存华屋，零落山丘。

Translogiĝo al la orienta korto de patrinflanka familio

—laŭ melodio *Rondiĝo de luno kaj homoj*

1.

Montoj kaj montoj baras la urb-bruon
de nia vilaĝeto kun rikolto bona.
Mi translogiĝis kaj jam tie min fiksis.
Tra la fenestr' vidiĝas la montar' impona
kaj post la domo kreskas densaj pinoj.
Mi donos kampojn kaj arbaron en futuro
al miaj idoj malgraŭ mia peno.
Mi zorgas nur pri l' luno en brilpuro
kaj friska vento, kiu min karesas,
kiam mi ebriiĝas en plezuro.

2.

En l' reĝa templo staras mil persikaj arboj,
sed la falintaj floroj jam senspuris en roj-flu'.
Ne volu koni ĉu la fluo klaras aŭ ne,
ĉu tie venas bovoj aŭ ĉevaloj kun voĉbru'.
Kiam Xie, l' general' de l' Orient-Jin-dinastio
revenis al la hejmloko en bonfart' ne plu,
ve, lia nev' abunde larmis ĉe pereo lia.
Mi jam forgesis tion en ebria ĝu'.
De antikvec' ĝis nun la sento samas:
eĉ se vi loĝas jen en luksa la konstru',
post mort' neeviteble viaj ostoj
enteriĝis en dezerta monto, ĉu?

杨果 (1195-1269)

小桃红

采莲女

1. 满城烟水月微茫，人倚兰舟唱。常记相逢若耶上，隔三湘，碧云望断空惆怅。美人笑道：莲花相似，情短藕丝长。
2. 采莲湖上棹船回，风约湘裙翠。一曲琵琶数行泪，望君归，芙蓉开尽无消息。晚凉多少，红鸳白鹭，何处不双飞。

Yang Guo (1195-1269)

Lotussem-kolektantino

—laŭ melodio *Ruĝa persikfloro*

1.

Super l' urbo pendas nebulfumo
kaj malklaras akvo de l' rivero.
Belulino zumas kanton en boato.
Ofte mi memoras, ke ni kun sincero

renkontiĝis ĉe la silk-lava lago.
Inter ni nun staras la tri-laga sfero,
mi rigardas sopireme vane al la ĉielo.
La belino diras kun rideto tra l' aero:
“Ni similas al lotus-rizomo, kiu povas
ja rompiĝi, sed nin ligas ĝiaj fibroj sen ŝancelo.

2.

Post kolektad' de lotussemoj
ŝi remas boateton en vesper'.
Helverda jupo ŝia krispiĝas en venta pel'.
Muziko biva tiras larmojn el
okuloj ŝiaj pro sopiroal reveno
de ŝia edzo el la foro.
Jam lotusfloroj fadas ĝis koloro
malhela, sed el li mesaĝet' nenia
atingas ŝin kun maltrankvila koro.
Rigardas ŝi al la malvarma ĉiel':
ambirdoj ruĝaj kaj ardeoj blankaj
jen pare flugas en krepusk-hel'.

刘秉忠 (1216–1274)

干荷叶

1. 干荷叶，色苍苍，老柄风摇荡。减清香，越添黄，都因昨夜一场霜。寂寞在秋江上。
2. 干荷叶，色无多，不耐风霜剉。贴秋波，倒枝柯，宫娃齐唱采莲歌。梦里繁华过。
3. 南高峰，北高峰，惨淡烟霞洞。宋高宗，一场空，吴山依旧酒旗风。两度江南梦。

Liu Bingzhong (1216-1274)

—laŭ melodio *Sekaj lotusfolioj*

1.

La lotusfolioj sekaj
en malhela la koloro
kaj velkintaj tigoj ĝiaj
jen svingiĝas en ventfolio.
Malpliĝas ja la bonodoro,
pli flaviĝas ili pale.
Pro lastnokta prujno de rigoro
la lotusfolioj sur l' aŭtuna rivero
ja aspektas tristaj pli en izolo.

2.

La lotusfolioj sekaj
en verdaĉa la koloro
Ja ne povas kontraŭstari

prujnan baton de rigoro.
Ili strikte klinis sin sur la akvon
kun rompitaĵoj de malmolo,
aŭskultante al kantado de knabinoj
en palaco pri kolektado de lotussemoj,
sed la pomp' jam svenis en la foro.

3.

Montpinto suda,
montpinto norda,
Ĉielarka Kavo en nebulo
aspektas tristaj en soleca brulo.
L' imperiestro Gaozhong de Song-dinastio
kondukis sian regnon ĝis la nulo.
Sur monto Wu ankoraŭ vinkolportaj flagoj
jen flirtas en zefiro kun susuro.
La sonĝo pri restaŭro de Song-dinastio
jam ne plu realiĝos ja en bonaŭguro.

杜仁杰 (约1201-1282)

耍孩儿

庄家不识勾阑

1. 风调雨顺民安乐，都不似俺庄家快活。桑蚕五谷十分收，官司无甚差科。当村许下还心愿，来到城中买些纸火。正打街头过，见吊个花碌碌纸榜，不似那答儿闹穰穰人多。
2. 【六煞】见一个人手撑着椽做的门，高声的叫“请、请”，道迟来的满了无处停坐。说道：前截儿院本《调风月》，背后么末敷演《刘耍和》。高声叫：赶散易得，难得的妆哈。
3. 【五煞】耍了二百钱放过咱，入得门上个木坡，见层层叠叠团圞坐。抬头觑是个钟楼模样，往下觑却是人旋窝。见几个妇女向台儿上坐，又不是迎神赛社，不住的擂鼓筛锣。
4. 【四煞】一个女孩儿转了几遭，不多时引出一伙，中间里一个央人货，裹着枚皂头巾顶门上插一管笔，满脸石灰更着些黑道儿抹。知他待是如何过？浑身上下，则穿领花布直裰。
5. 【三煞】念了会诗共词，说了会赋与歌，无差错。唇天口地无高下，巧语花言记许多。临绝末，道了低头撮脚，爨罢将么拨。
6. 【二煞】一个妆做张太公，他改做小二哥，行行行说向城中过。见个年少的妇女向帘儿下立，那老子用意铺谋待取做老婆。教小二哥相说合，但要的豆谷米麦，问甚布绢纱罗。
7. 【一煞】教太公往前那不敢往后那，抬左脚不敢抬右脚，翻来复去由他一个。太公心下实焦燥，把一个皮棒槌则一下打做两半个。我则道脑袋天灵破，则道兴词告状，划地大笑呵呵。
8. 【尾】则被一胞尿，爆的我没奈何。刚捱刚忍更待看些几个，枉被这驴颓笑杀我。

Du Renjie (c. 1201-1282)

Kampulo ne konas teatron

—laŭ melodio *Inciteto al infano*

1.

Feliĉe vivas popolanoj,
kiam favoras al rikoltoj la vetero,

sed la plej gaja estas la kampulo,
ĉar en la jaro de rikolto riĉa
je la morusfolioj kaj gren-livero,
neniu oficialulo ĝenas lin laŭvole.
Mi iris al la urbo laŭ vot- espero
fari aĉeton de incenso kaj kandeloj
por kulti dankan riton de ofero.
Kiam mi iris tra la urbon,
mi vidis buntajn anoncetojn sur papero.
Nenie amasiĝis tiom da personoj
bruplene interpuŝiĝantaj sub ĉielo.

2. —laŭ melodio *La sepa strofo antaŭ la lasta*

Mi vidis unu homon sin apogi
al pordokadr' kriante en akuta tono:
“Bonvenu, ho, bonvenu, uloj,
eniri, se malfruos, vi ne havas sub la dispono
sidlokon. La unua teatraĵo estas
La vent' kaj luno, kaj por la aldono
prezentos oni brilan komikaĵon.
Facilas spekti stratan ludon de fripono,
sed malfacilas sidi kaj satĝui
prezentojn de la teatroludantoj en salono!”

3. —laŭ melodio *La sesa strofo antaŭ la lasta*

Mi pagis du cent groŝojn kaj eniris,
ascendis la deklivon el lignaro plue.
Tavolon kaj tavolon tie oni sidis ronde,
scenejo tursimila staris alt-situe.
Malsupre la spektantoj interpuŝiĝante onde.
Muzikistinoj kelkaj sidis sur scenejo prete.
Pro kio oni gongis kaj tamburis brue,
ĉar tio estis ne kultado laŭprocede?

4. —laŭ melodio *La kvara strofo antaŭ la lasta*

Sur la scenej' knabino kelkajn rondojn
iradis kaj aperis poste la enveno
de grupo da ludantoj por aktori.
Trovegis inter ili la burleska arlekeno
kun nigra kapovest' per plumo enŝovita.
Sur liaj vangoj jen ŝmiriĝis kalka blank' en pleno
kaj kelkaj nigraj strekoj desegniĝis.
Do, kion faros li en sekvanta sceno?
De lia kolo ĝis piedoj lin kovris

la kolorriĉa robo el sateno.

5. —laŭ melodio *La tria strofo antaŭ la lasta*

Li legis versojn

kaj kantis kantojn.

Okazis io senerara.

Neniu sciis, kio estas bona aŭ malbona.

Mi nur memoras pri vortar' nektara.

Ĉe l' fino de prelud' prepara

li klinis kapon kun piedoj kunmetitaj preme.

Post tio dramo komenciĝos tuj laŭ-ĉene.

6. —laŭ melodio *La dua strofo antaŭ la lasta*

Aktoro rolis kiel olda avo,

kaj la alia kiel vinvendeja la kelnero.

Irante, ili babiladis

kaj haltis en la centro de l' scenejo.

Virino juna staris ĉe pordokurteno.

La avo kovis la ideon preni

ŝin kiel la edzinon por mastrumi hejmon.

Li petis la kelneron peri la aferon,

demandi al ŝi klare kiom da tritik' kaj greno

kaj kiom da saten' kaj silk' laŭ ŝia dota peto.

7. —laŭ melodio *La antaŭlasta strofo*

La avo ne kuraĝis posten iri,

se ordonite iri antaŭen,

kaj ne kuraĝis movi dekstran la piedon,

se ordonite movi l' livan en promen'.

Li turnis sin jen posten jen antaŭen, kondukite.

Anksia, li ekrompis led-volvitan stangon mem

en pecojn du eĉ antaŭ rigardantoj.

Ĉu la krani' rompita laŭ mia miskompren'?

Mi timis, ke li plendos al juĝisto,

sed ili jen eksplodis per ridego de senĝen'.

8. —laŭ melodio *Epologo*

Ve, min tiumomente kaptis emo pisi,

ne povis mi retenigi ĝin plenforte.

Mi volis vidi ja pli multe plu, sed vane.

Bastardoj tiuj eble pri mi ridaĉos ĝismorte.

王和卿 (?-?)

醉中天

咏大蝴蝶

弹破庄周梦，两翅驾东风，三百座名园、一采一个空。谁道风流种，唬杀寻芳的蜜蜂。轻轻飞动，把卖花人搨过桥东。

Wang Heqing (?-?)

Kanto pri giganta papilio

—laŭ melodio *Ĉielo de ebrulo*

Rompinte l' sonĝon de la filozofo Zhuangzi,
ŝi rajdas sur la orienta vent',
kaj jam kolektas ĉiom da miel' el ĉiuj floroj
en la ĝardenoj famaj jen tri cent.
Ŝi, l' amatin' de floroj kaj zefiro,
eĉ fortimigas miel-serĉan abelaron kun lament'.
Svingante gaz-similan flugilparon,
ŝi forventumas florvendiston al la punta orient'.

一半儿

题情

1.

书来和泪怕开缄，又不归来空再三。这样病儿谁惯耽？越恁瘦岩岩，一半儿增添一半儿减。

2.

将来书信手拈着，灯下恹恹观觑了。两三行字真带草。提起来越心焦，一半儿丝撮一半儿烧。

3.

别来宽褪缕金衣，粉悴烟憔减玉肌，泪点儿只除衫袖知。盼佳期，一半儿才干一半儿湿。

Ĉagreno pro disiĝo

—laŭ melodio *Duono kaj duono*

1.

Leteron lian mi ricevas,
mi ne kuraĝas ĝin malfermi en hezito,
timante la promeson el li hejmeveni,
sed lia nereveno min reduktas jen al malekscito.
Kiu elteni povus la pli longigitan sopiremon
kaj vivi iele-trapele sen trepido?
Sopir' pliiĝas unuflanke,
kaj aliflanke mi magriĝas en rapido.

2.

Mi prenis la leteron kaj ĝin legis
sub la lamplumo kun zorgemo.
Li skribis du aŭ tri liniojn
eĉ nelegeblajn kaj plenajn de ĝeno.

Pro tio mi anksiis kaj ĝin disŝirinte,
mi ĝin bruligis kune kun ĉagreno.

3.

Post foriro lia mi magriĝis,
mia robo orlita per orfadenoj jam loziĝis tre.
Nur maniko larĝa konas miajn larmojn,
kiam mi sopiras al vi kara, je korŝira apoge'.
Dum la manik' duone ĵus sekiĝas,
ĝi denove malsekiĝas de larmeroj, ve!

盍西村 (? — ?)

小桃红

江岸水灯

万家灯火闹春桥，十里光相照，舞凤翔鸾势绝妙。可怜宵，波间涌出蓬莱岛。香烟乱飘，笙歌喧闹，飞上玉楼腰。

He Xicun (?-?)

Lanterna lumo sur rivero

—laŭ melodio *Ruĝa persikfloro*

Dek mil lanternoj jen sur bordoj kaj boatoj
kontrastas bunte brile je dek lioj fore.
Lanternoj feniks-formaj ŝajnas danci
kaj la drakformaj saltaj fole.
Kia spektaklo de lanterna nokto!
El ondoj feaj la insuloj jen ĉihore
leviĝas miraĝece el rivera fundo.
La fumo de incenso kaj fajraĵoj sore
tumulte ŝvebas en aero svaga,
flutsonoj kaj homvoĉ' rumore
sonoras kaj spiralas ĉirlaŭ la talio
de l' alta luksa etaĝdomego jen petole.

小桃红

客船晚烟

绿云冉冉锁清湾，香彻东西岸。官课九分办；厮追攀，渡头买得新鱼雁。杯盘不干，欢欣无限，忘了大家难。

Boato en vesperkrepusko

—laŭ melodio *Ruĝa persikfloro*

Verdetaj nuboj jen vualas
la klaran estuaron lante,
aromo herba ŝvebas
eosten kaj uesten river-rande.

Nur naŭ dekonojn da impost' ĉijara
pagigas nin l' instanco postulante.
En kia ĝojo oni dronas!
Ĉe la pramej' aĉetas oni grandakvante
da fiŝoj, salikokoj por prepari
bongustajn pladojn jen por ĝui frande
kaj drinki kvazaŭ en festen'. Forgesu
mizeron en la viv' konstante.

小桃红
杂咏

杏花开候不曾晴，败尽游人兴。红雪飞来满芳径。问春莺，春莺无语风方定。小蛮有情，夜凉人静，唱彻醉翁亭。

Mezprintempe

—laŭ melodio *Ruĝa persikfloro*
Kiam la abrikot' disfloras,
senĉesa pluvo desapontas vere
spektantojn, kaj petaloj ruĝaj
kiel neĝeroj falas jen leĝere
sur la montajn vojojn plene.
Mi pretervole ĉuas kun-tenere
al oriolo, kie estas la printempo.
Ĝi tamen ne respondas ja iele
en vento jam kvietiĝinta.
Aŭdiĝas kanto fluganta etere
de kantistino en ĉi frida nokto
el la kiosko Ebriul' animkonkere.

商挺 (1209-1288)

潘妃曲

带月披星担惊怕，久立纱窗下，等候他。暮听得门外地皮儿踏，则道是冤家，原来风动茶蘼架。

Shang Ting (1209-1288)

—laŭ melodio *Kanto de princino Pan*
Kun maltrankvil' kaj timo
sub lum' de l' luno kaj stelaro,
mi staras longe ĉe l' fenestro
en mia buduaro,
lin atendente.
Mi aŭdas paŝojn jen kun knaro,
mi prenis tion por li, mia kara.
Okazis, ke tremetas la pergol' sub ventbarbaro.

胡祇通 (1227-1295)

沉醉东风

渔樵

渔得鱼心满意足，樵得樵眼笑眉舒。一个罢了钓竿，一个收了斤斧，林泉下偶然相遇。是两个不识字渔樵士大夫，他两个笑加加的谈今论古。

Hu Zhiyu (1227-1295)

Fiŝisto kaj lignohakisto

—laŭ melodio *Ebria en orienta vento*

Fiŝist' kontentas kiam li

ekhavas fiŝojn en la mano.

Lignohakisto ridmienas kiam li

ekgajnas lignojn de kaŝtano.

Fiŝisto sursultrigas la hokstangon,

lignohakist' retiras la hakilon kun balzamo.

Rehejmirante ili renkontiĝas

hazarde jen ĉe monta la fontano.

Analfabetaj, ili tamen konas

aferojn de l' diverskolora gamo.

Ridante ili babiladas flue

pri nuno kaj pasinto sen arkano.

伯颜 (1235-1294)

喜春来

金鱼玉带罗襦扣，皂盖朱幡列五侯，山河判断在俺笔尖头。得意秋，分破帝王忧。

Bo Yan (1235-1294)

—laŭ melodio *Bonvenigo al la printempo*

Kun orfiŝo-desegna rob' satena

kaj jada zono ĉe l' talio,

mi, kiel ĉef' de kvin markizoj,

veturas eskortata de la ruĝa flaglinio

sub nigra baldaken'. Mi regas

per la plumpinto super regna la teritorio.

Kiel fieras mi en ĉi aŭtuno!

Mi kundividas kun regnestro

la sentojn de la ĝojo kaj melankolio.

王恽 (1226-1304)

平湖乐

尧庙秋社

社坛烟淡散林鸦，把酒观多稼。霹雳弦声斗高下，笑喧哗，壤歌亭外山如画。朝来致有，西山爽气，不羨日夕佳。

Wang Yun (1226-1304)

Aŭtuna festivalo ĉe la templo de Imperiestro Yao

—laŭ melodio *Ĝojo de kvietaj lago*

Incensfumo fadas el l' altaro,
korvoj malaperas nesten en arbaro.
Kun vintas' en man' mi pririgardas
la grenkampojn en prospero. Altas
kaj malaltas kordmuziko aerflue
meze de ridsonoj laŭtaj brue.
Ekster pavilono montoj belas
kaj zefiro friska mole pelas.
Sur la Monto Okcidenta, ĉe aŭroro,
la aero freŝas kun aroma bonodoro.
Mi trankvilan vivon vivas sen ĉagreno,
ne envias mi ermiton kun ĝu-pleno.

卢挚 (1235-1314)

节节高

题洞庭鹿角庙壁

雨晴云散，满江明月。风微浪息，扁舟一叶。半夜心，三生梦，万里别，闷倚篷窗睡些。

Lu Zhi (1235-1314)

Surskribo sur la templa muro ĉe Dongting-lago

—laŭ melodio *Alten kaj pli alten*

Post pluvo la ĉiel' serenas
kaj nuboj jam disiĝis malapere.
Radioj de la luma luno reflektiĝas
rebrile plenrivere.
Mi remas en boato sur kvietaj ondoj
kaj blovas vent' leĝere.
En nokt' profunda, pro disiĝo de amiko,
mi ĉagreniĝas sola vere.
Mi por mallonga dorm' apogas
min ĉe boatgiĉet' ĝenŝvele.

沉醉东风

(1) 秋景

挂绝壁松枯倒倚，落残霞孤鹜齐飞。四周不尽山，一望无穷水，散西风满天秋意。夜静云帆月影低，载我在潇湘画里。

(2) 闲居

恰离了绿水青山那答，早来到竹篱茅舍人家。野花路畔开，村酒槽头榨。直吃的欠欠答答。醉了山童不劝咱，白发上黄花乱插。

(3) 春情

残花酿蜂儿蜜脾，细雨和燕子香泥。白雪柳絮飞，红雨桃花坠，杜鹃声里又春归。纵有新赠

别离，医不可相思病体。

—laŭ melodio *Ebria en orienta vento*

1. Aŭtuna pejzaĝo

Sur klifo pendas pino renversita,
fazano sola kaj numeroj flosas ĉe vespero.
Ĉirkaŭe etendiĝas montovico senfina,
senlime vastas akvsurfaco de l' rivero.
La vent' el okcidento blovas forte,
etos' aŭtuna pli densiĝas super tero.
En nokt' kvieta la lunbrilo pura
prilumas la nubvelojn alte sur ĉielo.
Mi en boato kvazaŭ glitus en pentraĵo
de monto kaj rivero vualita jen per belo.

2. Rura vivo

Ĵuse forlasinte verdan monton
kaj riveron en koloro blua,
mi atingas la kabanon pajl-tegmentan
kun plektobaril' bambua.
Sovaĝfloroj pompas ĉe la vojo,
alkohol' eliĝas en rojeto flua
en la vinfarejo ĉe la vilaĝfino.
Mi drinkadas per glutado brua
ĝis ebrio, sed neniŭ knabo ridas pri mi,
se mi stumblas kun vingusto ĝua.
Mi deŝiras flavajn florojn laŭ la vojo
kaj enŝovas ilin en la harojn jen per mano skua.

3. Sento en printempo

Abeloj kolektadas sukon
el jam velkintaj floroj are,
hirundoj jen buŝprenas koton
malsekigitan de pluvakv' elvale.
Salikaj flokoj flirtas kiel blanka neĝo,
persikaj floroj ruĝaj pluvas fale.
Kukoloj kantas por forsendi
printempon jen kaj jen pepklare.
Poemojn skribas mi por disiĝo via,
sed ili povas ne kuraci
hejmveon vian jen reale.

蟾宫曲

1. 扬州汪右丞席上即事

江城歌吹风流，雨过平山，月满西楼。几许年华，三生醉梦，六月凉秋。按锦瑟佳人劝酒，卷朱帘齐按凉州。客去还留，云树萧萧，河汉悠悠。

2. 醉赠乐府朱帘秀

系行舟谁遣卿卿？爱林下风姿，云外歌声，宝髻堆云。冰弦散雨，总是才情。恰绿树南熏晚晴，险些儿羞杀啼莺。客散邮亭，楚调将成，醉梦初醒。

—laŭ melodio *Ario de Luna Palaco*

1. Improvizaĵo ĉe la festeno

En urbo ŝvebas flutmuziko
kaj kantoj gajaj en aero.
Pluvet' balaas monton Pingshan,
la okcidenta dom' trempitas en lunluma helo.
Jam olda mi fariĝis, sed ankoraŭ
mi dronas en ebria sonĝa sfero.
Ĉi-tempe en junio kvazaŭ en aŭtuno
ja regas friska la vetero.
Liutistino bela jen proponas vinon,
el ruĝaj pendkurtenoj, kun leĝero
elvenas dancistinoj, dancas laŭ l' arion de la fronto.
Mi perboate forveturis sur rivero,
sed gastigant' ankoraŭ voĉas por reteno.
Sur ambaŭ bordoj arboj pompas en apero
siblantaj en ventpelo, kaj la Lakta Vojo
flagrete glimas sur malhela la ĉielo.

2. Skribita dum ebrieco por mia amata kantistino

Kiu sendas vin al mi sur la boato?
Mi ja ŝatas, ke vi venas kun leĝero
en arbaron kaj kantvoĉo via ŝvebas
kvazaŭ el nubbar' sur la ĉielo.
Kun nubforma hartubero vi glaciajn kordojn
de liuto plektras per pluvbata maniero.
Kian genian talenton vi disvolvas!
Suda vento blovas el arbaro verda ĉe vespero.
Via kanto vere igas oriolejn ja hontemaj.
Kiam gastoj jen disiĝas, mi min sentas en sufero
de forlasiteco. Mi vekigas el ebrio
kaj mi verkas ĉi poemon jen por via kant-opero.

殿前欢

酒杯浓，一葫芦春色醉山翁，一葫芦酒压花梢重。随我奚童，葫芦乾兴不穷。谁与共？一带青山送。乘风列子，列子乘风。

—laŭ melodio *Ĝojo antaŭ palaco*

Aromas dense vino.
Botelkukurbo da printemp-koloro
jen ebriigas min oldulon.
Botelkukurb' da vin' kun bonodoro
kurbigas peze arbopinton.
Servknabo mia sekvas min jen sen petolo,
kvakam botelkukurbo jam malplenas,
mi tamen dronas en gajplena la humoro.
Kiu ja drinkus kune kun mi?
Montĉeno verda diras adiaŭon kun bonvolo.
Mi paŝas kvazaŭ rajde sur ventdorso
leĝere laŭ la vojo sub instig' de alkoholo.

寿阳曲

夜忆

窗间月，檐外铁，这凄凉对谁分说。剔银灯欲将心事写，长吁气把灯吹灭。

Nokta rememoro

—laŭ melodio *Kanto pri longviva suno*
Ekster fenestro pendas luno en soleco,
aŭdiĝas tintoj de ventsonoriloj ĉe alero.
Al kiu povus mi rakonti pri tristeco mia?
La meĉon de l' arĝenta lampo
altigas per eltiro mi al plia helo,
kaj pretas skribi rememorojn
kaŝitajn jen profunde en korĉelo.
Kun longa vesuspiro tamen
mi blovestingas lampon sen espero.

蟾宫曲

沙三伴哥来啖

沙三伴哥来啖！两腿青泥，只为捞虾。太公庄上，杨柳阴中，磕破西瓜。小二哥昔涎刺塔，碌轴上滄着个琵琶。看荞麦开花，绿豆生芽。无是无非，快活煞庄家。

Alvenas du kampuloj

—laŭ melodio *Ario de Luna Palaco*
Alvenas du kampuloj
kun makulitaj kruroj jen per koto ŝlima
pro kapt' de salikokoj en akvkampoj.
En la bieno de la maljunul' senlima,
sub ombr' de salikarbo ili akvmelonon
disrompas por la buŝo senabstina.
Apuda kampolaborist' ne rajtas ĝui
kaj salivumas je la scen' fascina.

Li kuŝas dorse sur ŝtonmuelilo
ja kiel renversita biv' kun kap' malklina.
Ĉirkaŭe fagopiroj blanke floras,
verdfaboj ĝermas en la kamp' proksima.
Ekzistas nek konkuro nek batalo de l' palaco,
kampuloj vivas ĝoje sen ĉagren' deprima!

寿阳曲

别珠帘秀

才欢悦，早间别，痛煞煞好难割舍。画船儿载将春去也，空留下半江明月。

Adiaŭ al ŝi

—laŭ melodio *Kanto pri longviva suno*

Ni ĵuse nin amuzis kune,
sed ĝojo tuj finiĝis
kaj adiaŭas ni ja nune.
Disiĝas ni kun domaĝemo
kaj tranĉa kordoloro, dume
boato jam forportis ŝin, nur
mi restas kun lunlum' surdune.

陈草庵 (1245- ĉ. 1330)

山坡羊

叹世

晨鸡初叫，昏鸦争噪，那个不去红尘闹。路遥遥，水迢迢，功名尽在长安道，今日少年明日老。
山依旧好；人憔悴了。

Chen Cao'an (1245- ĉ. 1330)

Lamento pri la vivo

—laŭ melodio *Kapro sur montdeklivo*

Kokerikas koko en maten',
brue grakas korvoj ĉe vespero.
Kiu ne voluntas ĉasi famon en la mondo?
Etendiĝas foren la rivero,
voj' longlongas al ĉielo.
Por sukces' al famo kaj profito
oni devas streĉi sin per granda pen'
en la regna metropolo.
Hodiaŭa jun' fariĝos la morgaŭa splen'
de maljun' sen ajna esperplen'.
Montoj restas tiel verdaj kiel iam,
homoj tamen magras kun ĉagren'.

关汉卿 (1220-1300)

白鹤子

1.

四时春富贵，万物酒风流。澄澄水如蓝，灼灼花如绣。

2.

花边停骏马，柳外缆轻舟。湖内画船交，湖上骅骝骤。

3.

鸟啼花影里，人立粉墙头。春意两相牵，秋水双波溜。

4.

香焚金鸭鼎，闲傍小红楼。月在柳梢头，人约黄昏后。

Guan Hanqing (1220-1300)

—laŭ melodio *Blanka Gruo*

1.

Printempo estas la sezono plej valora,
Alkoholaj' instigas ĝojon plej al fundo kora.
Lagakvo bluas kiel indig-planto,
la floroj okulplaĉas kiel brilanta rubando.

2.

Stalonoj staras ĉe florbedo,
boatoj jen ligitas ĉe salika arbpiedo.
Sur lag' boatoj jen kaj jen navedas,
ĉe lag' ĉevaloj ir-reire galopetas.

3.

Birdoj pepas sub la ombr' de floroj,
ĉe kalkita muro staras hom' dum horoj.
Ili ĉiuj ja baniĝas en printempa la aero,
la okuloj homaj rojas kun aŭtuna belo.

4.

Incenso brulas en anasoforma ujo ora,
mi staras senfareme ĉe dometo ruĝkolora.
La luno pendas alte super salikpintoj
amantaj paroj rendevuas en krepuskaj vindoj.

四块玉

别情

自送别，心难舍，一点相思几时绝？凭阑袖拂杨花雪。溪又斜，山又遮，人去也！

Ĉe disiĝo

—laŭ melodio *Kvar pecoj de jado*

De kiam vi forlasis,

mi kovas senton de sopiro.
Ĝis kiu tag' finiĝos mia splen'?
Min apogante sur la parapeton kun suspiro,
mi banas min en neĝofloka karesplen'.
La rivereto etendiĝas en sinua iro,
la monto baras mian vidon jen per ĝen',
sed vi jam foras, mia viro!

四块玉

闲适

1.

适意行，安心坐，渴时饮饥时餐醉时歌，困来时就向莎茵卧。日月长，天地阔，闲快活！

2.

旧酒投，新醅泼，老瓦盆边笑呵呵，共山僧野叟闲吟和。他出一对鸡，我出一个鹅，闲快活！

3.

意马收，心猿锁，跳出红尘恶风波，槐阴午梦谁惊破？离了利名场，钻入安乐窝，闲快活！

4.

南亩耕，东山卧，世态人情经历多，闲将往事思量过。贤的是他，愚的是我，争甚么？

Senokupa tempo

—laŭ melodio *Kvar pecoj de jado*

1.

Se vi volas paŝi,
paŝu kun libero;
se vi volas sidi,
sidu sen konsidero;
kiam vi soifas,
trinku el sitelo;
kiam vi malsatas,
manĝu per telero;
kiam vi ebrias,
kantu laŭ prefero;
kiam vi dormemas,
kuŝu sur herboza tero.
Lun' kaj sun' eterne brilas,
vastas tero kaj ĉielo.
Kiel ni plezure vivas kun leĝero!

2.

Malnova vino distilita jam refoje
kaj nova vin' nun ankaŭ pretas.
Ĉirkaŭ vin-urn' argila ĉiuj ĝoje
ridegas, babilante kun maljuna vilaĝano
kaj taŭisto-pastor' ĉevoje.

Unu oferis kokon kaj l' alia
anseron jen por fari pladojn kune.
Kian plezuran vivon ili havas nune!

3.

Haltigu ĉeval-galopantan penson
kaj ŝlosu simieskan cerbon nun kun fantazio.
Vin liberigu de la furiozaj ondoj
en homa mondo plena je bizara iluzio.
Vekiĝu el tagmeza sonĝo bela!
Forlasu l' rondon de famĉasa sen racio,
ŝoviĝu en komfortan neston propran.
Kiel plezuran vivon jen vi ĝuu sen anksio!

4.

Mi iam plugis sudan kampon
kaj kuŝis sur la monton en la oriento.
Mi spertis multon de la homa mondo
kaj ankaŭ pensis pri paseoj en silento.
Li estas saĝa
dum mi ja stultas sen talento.
Kian signifon tio donas,
se mi konkurus suferante de turmento?

沉醉东风

送别

咫尺的天南地北，霎时间月缺花飞。手执着饯行杯，眼阁着别离泪。刚道得声保重将息，痛煞煞教人舍不得，好去者前程万里。

Ĉe disiĝo

—laŭ melodio *Ebria en orienta vento*
Kvankam ni nun estas vid-al-vidaj,
vi foriros tuj al dista foro.
Dum momento floroj velkus
kaj la lun' malkreskus sen lumgloro.
Por adiaŭ diri ni vin-tason tenas,
niaj larmoj plenas en okuloj en ĉi horo.
Kiam mi ĵus diris: “Zorgu vian sanon!”
mi ekhavas domaĝemon en la koro.
“Iru do por via brila perspektivo!”
mi nur povas diri kun doloro.

大德歌

谢家村，赏芳春，疑怪他桃花冷笑人。着谁传芳信，强题诗也断魂。花阴下等待无人问，则听得

黄犬吠柴门。

—laŭ melodio *Kanto pri granda virto*

Mi paŝadas por apreci florojn
de printempo en vilaĝ' kvieta.
Ĉu persikaj floroj ridas pri mi, mi ja dubas.
Kie en florara ombr' sin kaŝas ŝi koketa?
Se mi min devigus skribi versojn por ŝi,
tio ankaŭ min ĉagrenus en humoro teda.
Mi atendas ĉe florombro, sed neniu min demandas,
nur aŭdiĝas ĉe lignpordo la bojad' obseda.

大德歌

1. 春

子规啼，不如归。道是春归人未归。几日添憔悴，虚飘飘柳絮飞。一春鱼雁无消息，则见双燕斗衔泥。

2. 夏

俏冤家，在天涯。偏那里绿杨堪系马。困坐南窗下，数对清风想念他。蛾眉淡了教谁画，瘦岩岩羞带石榴花。

3. 秋

风飘飘，雨潇潇，便做陈抟睡不着。懊恼伤怀抱，扑簌簌泪点抛。秋蝉儿噪罢寒蛩儿叫，淅零零细雨打芭蕉。

4. 冬

雪纷纷，掩重门，不由人不断魂，瘦损江梅韵。那里是清江江上村，香闺里冷落谁瞅问？好一个憔悴的凭栏人。

—laŭ melodio *Kanto pri granda virto*

1. Printempe

Kukolo ĉirpas,
sonante ŝajne “Vi revenu, venu do!”
Vi ĉe disiĝo diris, ke printempe
vi ja revenos, sed vi ne ankoraŭ en ĉi minuto.
Dum tagoj mi jam magras multe
malforta kiel salikfloko en flirtanta ludo.
De vi mi ricevis neniun mesaĝon,
mi vidas, ke konstruas neston hirundpar' per kotoŝuto.

2. Somere

Amata mia, li restadas en la foro,
kial li ĉiam ligas la ĉevalon al saliko tie?
Inertas mi ĉe la fenestro suda pigre
kaj mi min banas en zefir' sopiras lin anksie.
Do, kiu povus pentri brovojn por mi,
kiam dekoloriĝas ili ĝis paliĝo plie?

Mi hontas eĉ surporti granatflorojn sur hararo,
ĉar mi skelete magras ja konscie.

3. Aŭtune

Vento blovas kun susuro,
pluvo flirtas en leĝero.
Mi ne povas endormiĝi
eĉ sub la favoro de Ĉielo.
La ĉagreno en la sin' min igas
larmi kiel fluo de rivero.
Ĉirp' de girloj kaj cikadoj, kaj pluvbatoj
sur la bananujoj pli min ĝenas per sufero.

4. Vintre

Neĝo dense flirtas,
kovras kelkajn pordojn peze.
Tio rompas mian koron
en la magra korp' agrese.
Kie estas la vilaĝo lia?
Mi ne povas nun distingi klare.
Min neniu venas zorgi buduare,
Kia minca povrulin' mi estas
nur apoge al la parapeto por vidi senfare!

碧玉箫

1. 膝上琴横，哀愁动离情。指下风生，潇洒弄清声。锁窗前月色明，雕阑外夜气清。指法轻，助起骚人兴，听，正漏断人初静。
2. 席上樽前，衾枕奈无缘。柳底花边，诗曲已多年。向人前未敢言，自心中祷告天。情意坚，每日空相见。天，甚时节成姻眷。

—laŭ melodio *Fluto el smeralda jado*

1.
kun la liuto sur genuoj miaj
mi pensas pri amato mia en la foro.
Sub delikataj fingroj
la kordoj vibras ja leĝere kun sonoro.
Ĉe la fenestro luno brile lumas;
tra parapeto ŝvebas la aer' de molo.
Malpezaj tuŝoj miaj sur liuto
instigas min al versoskriba la fervoro.
Aŭskultu!
Klepsidro jam malplenas,
silento nokta regas en ĉi horo.

2.

Ni ofte renkontiĝas
kaj drinkas en festeno,
sed ni ne havas ŝancon kuŝi
en sama lit' kun litkovrilo kaj kapkuseno.
Ĉe floroj aŭ sub salikarbo
mi kantis kaj vi versis multajn jarojn jen sen ĝeno.
Ĉu povus mi malkovri tion al aliaj?
Mi preĝas en la kor' nur al ĉiel-edeno.
Ni havas firman volon de amsento
sed vid-al-vidas tage ni en van' kun ĝemo.
Ĉielo, ho ve!
Dum nia viv', en kiu tago ni fariĝos
la edzo kaj edzino en feliĉa pleno?

一枝花

1. 不伏老

攀出墙朵朵花，折临路枝枝柳。花攀红蕊嫩，柳折翠条柔，浪子风流。凭着我折柳攀花手，直煞得花残柳败休。半生来折柳攀花，一世里眠花卧柳。

2. 梁州

我是个普天下郎君领袖，盖世界浪子班头。愿朱颜不改常依旧，花中消遣，酒内忘忧。分茶擷竹，打马藏阄；通五音六律滑熟，甚闲愁到我心头？伴的是银筝女银台前理银筝笑倚银屏，伴的是玉天仙携玉手并玉肩同登玉楼，伴的是金钗客歌金缕捧金樽满泛金瓯。你道我老也暂休。占排场风月功名首，更玲珑又剔透。我是个锦阵花营都帅头，曾玩府游州。

3. 隔尾

子弟每是个茅草冈、沙土窝初生的兔羔儿乍向围场上走，我是个经笼罩、受索网苍翎毛老野鸡踏踏的阵马儿熟。经了些窝弓冷箭镞枪头，不曾落人后。恰不道“人到中年万事休”，我怎肯虚度了春秋。

4. 尾

我是个蒸不烂、煮不熟、捶不匾、炒不爆、响铛铛一粒铜豌豆，恁子弟每谁教你钻入他锄不断、斫不下、解不开、顿不脱、慢腾腾千层锦套头？我玩的是梁园月，饮的是东京酒，赏的是洛阳花，攀的是章台柳。我也会围棋、会蹴鞠、会打围、会插科、会歌舞、会吹弹、会咽作、会吟诗、会双陆。你便是落了我牙、歪了我嘴、瘸了我腿、折了我手，天赐与我这几般儿歹症候，尚兀自不肯休！则除是阎王亲自唤，神鬼自来勾。三魂归地府，七魄丧冥幽。天哪！那其间才不向烟花路上走！

1. Ne diru, ke mi maljuniĝas

—laŭ melodio *Branĉo da floroj*

Mi plukas florojn trans mursupro
kaj salikbranĉojn ĉe la voj' deŝire.
pistiloj ruĝaj de la floroj delikatas
kaj salikbranĉoj molas jen gracile.
Galanta kiel mi, per mano mia,
mi plukas florojn kaj deŝiras branĉojn ja facile,

kaj mi turmentas ilin ĝis velkiĝo kaj ĉifiĝo.
Dum la duono de mia vivo
mi plukas kaj deŝiras florojn malhumile,
mi ankaŭ ŝatas dormi kune
kun floroj kaj salikvergetoj laŭdezire.

2. —laŭ melodio *Kanto pri batalkampo*

Mi estas la amindumant' plej granda sub la ĉielo,
kaj l' estr' de dandoj en la mondo.
Mi volas, ke neniuj vangoj perdu en nia rondo
rozruĝan la koloron kun saneca belo.
Mi min amuzas inter floroj kun prefero,
ĉagrenon mi forlavas per alkohol-fluo.
Kun teo-tas' en man' mi vetas per ĵetonoj el bambuo,
kaj hazardludas pri la ĉevalkur' kaj lot-mistero.
Mi lertas pri diversaj tonoj kaj tonaloj ja en muziksfero.
Kiel mi povus kovi ĝenojn en la koro?
Min akompanas la liutistino bela kiel floro,
ludante la liuton ĉe arĝenta ekranego per son-ŝvelo.
Ŝultro-ĉe-ŝultre, man-en-mane, kun fiero,
mi kun feina la reĝin' ascendas turon jen el jado.
La kantistin' surportas orajn haropinglojn por parado,
kun ora tas' en mano kantas pri vestaĵoj oraj en opero.
Vi diras, ke mi maljuniĝas, devas mi emeritiĝi ja sen espero,
sed mi elstaras la unua en aminduma la areno,
kaj pli kaj pli fariĝas lerta kaj senbrida sen kateno.
Nun mi la ĉefo estas inter floroj de volupt-leĝero,
irante de domego al domeg' laŭvole kun libero.

3. —laŭ melodio *Interludo*

Amindumantoj junaj ŝajnas la leporoj
ĵus naskiĝintaj en sabloza nesto, kiuj vere
kuraĝas iri al la ĉasopark' imperiestra,
dum mi similas al fazan' maljuna, plensufere
jam eskapinte el kaptil' kaj reto.
Mi kuras kiel galopanta la ĉevalo, enaere
je alta rapideco supertere.
Evitis mi kaŝitajn sagojn kaj lancpinton feran
kaj mi atingas nun mezaĝon tempopele.
Ne diru "Ĉio de mezaĝo jam finiĝis!",
mi kompreneble ja ne vivas vane kaj leĝere.

4. —laŭ melodio *Epilogo*

Mi estas ja tintanta bronza pizo,

kiu ne povas esti jen vaporumita mola,
 nek kuirita bone, nek martele platigita,
 nek kirl-fritita ĝis la eksplodiĝ' disflora.
 Kiel vi junaj amaĵistoj povas vin enŝovi
 en kaptil-reton, kiu povas esti ne ŝpatita bate,
 nek elnodita, nek liberigita malrapide?
 Mi ĝuas en ĝardeno reĝa l' lunon sate,
 mi drinkas bonkvalitan vinon de la orienta urbo,
 kaj mi aprecas famajn peoniojn nure,
 kaj amindumas kun putinoj en bordelo.
 Mi ankaŭ lertas en go-ludo senmezure,
 kaj en piedpilkad', ĉasad', gagado,
 kantado kaj dancado, liutlud' kaj plie,
 en vers-ĉantad' kaj hazardludo.
 Vi povus batfalogi mian denton jen defie,
 aŭ malrektigi mian buŝon,
 lamigi mian piedon
 disrompi mian manon sen kompatato.
 Mi tamen firme tenas min senŝanĝa
 sed mi neniel cedas eĉ sub sortobato,
 krom se la Reĝo de Infero aŭ l' demono
 alvokus min al la morto.
 Kiam triono da animo irus al Infero
 kaj aliaj du trionoj al malluma limba korto,
 Ho, la Ĉiel'! nur tiam mi ne plu direktiĝus
 al la amindumejo por diboĉa la komforto.

白朴 (1226-1306)

寄生草

饮

长醉后方何碍，不醒时有甚思。糟腌两个功名字，醅滹千古兴亡事，曲埋万丈虹霓志。不达时皆笑屈原非，但知音尽说陶潜是。

Bai Pu (1226-1306)

Drinkado

—laŭ melodio *Parazita herbo*

Kio gravas, se mi ebriiĝas?
 Se mi ne sobriĝas, kio ja eraras en tio?
 Ni dronigu famon, gloron per vin-feĉoj,
 ni reduktu falon kaj leviĝon de pasinto al nenio
 pere de vindrinko per grandegaj glutoj,
 kaj kovriĝu per alkoholaĵo l' ĉielarka ambicio.
 Tiuj, kiuj kapmalklaras pri la historio,
 fajfas pri sinĵeto en riveron de poeto Qu Yuan*,

sed la homoj saĝaj kaj prudentaj kun konscio
laŭdas, ke ermito Tao Qian** vivas rure en ebrio.

**Qu Yuan (340-278 a. K.) estas poeto de Chu-regno dum la periodo de Militantaj regnoj. Li estas la unua patriota poeto. Pro kalumnio de aristokratoj li perdis kredemon de la regnestro kaj li ĵetis sin en la riveron por manifesti sian fidelecon al la ŝtato.*

***Tao Qian (352-427) estas la unua pastorala poeto. Dum sia juneco li oficis kiel malaltrungulo. Pro malalta deveno li ofte renkontis malestimon, tiel ke li decidis iri al ruro kaj vivi ermite.*

阳春曲

题情

1. 轻拈斑管书心事，细折银笺写恨词。可怜不惯害相思，则被你个肯字儿，迤逗我许多时。
2. 鬓云懒理松金凤，胭粉慵施减玉容。伤情经岁绣帏空，心绪冗，闷倚翠屏。
3. 慵拈粉线闲金缕，懒酌琼浆冷玉壶。才郎一去信音疏，长叹吁，香脸泪如珠。
4. 从来好事天生俭，自古瓜儿苦后甜。奶娘催逼紧拘钳，甚是严，越间阻越情忺。
5. 笑将红袖遮银烛，不放才郎夜看书。相偎相抱取欢娱，止不过迭应举，及第待何如。
6. 百忙里铰甚鞋儿样，寂寞罗帏冷篆香。向前搂定可憎娘，止不过赶嫁妆，误了又何妨。

Dediĉe al mia kara

—laŭ melodio *Kanto de printempo*

1.

Mi levas mincan plumon el bambuo
por skribi surpapere vortojn de sopiro.
Mi dronas en la sent' de alkrociĝo
pro via jes' el via buŝo kun altiro,
ke vi allogas min al longtempa deziro.

2.

Mi pigras kombi nubsimilajn harojn
kun or-harpinglo preta tuj al falo.
Sen ŝmink' de pudr' kaj ruĝo
la vangoj disradias kun malhela palo.
Longtempe kun ĉagren' mi sola
restadas en malplena buduaro.
Apogas min al verda la ekrano
mi kun sufoka spleno en sent-valo.

3.

Mi ne emas veston tajloradi
aŭ fari kudrojn pro langvor',
nek vinon jen varmigi por
spiriton levi en malvarma hor'.
Amato mia jam foriris longe,
sed ne alvenas la mesaĝo de konsol'.
Mi nur suspiras jen de temp' al tempo,

survange kun fluantaj larmoj de dolor'.

4.

De ĉiam la Ĉielo traktas
aferon bonan ja ne kun favor'.
Melono en kreskad' amaras de komence
kaj dolĉas ĝis la maturiĝa hor'.
Mamnutristino min gvatas preme
kiel tenajlo kontraŭ mia amo el la kor',
sed ju pli strikte la tenajlo premas,
des pli ardiĝas nia am' el nia vol'.

5.

Kun ridet' mi levas larĝan la manikon
por lamplumon bari al li, evitante ke
li penege legu libron tra la nokto.
Ni brakumas nin, nestas kune jen plezure tre.
Nur por fari la preparojn por la ekzameno
al akiro de rangeco, li klopode legu, sed eĉ se
li sukcesos en la ekzamen' triumfe,
kio do valoras multe por la vivo? Ve!

6.

Kial vi okupiĝas pri tondad' de ŝu-ŝablono?
Atendas vin malplena lito kun soleca kulvualo
kaj la incensa cindr' jam malvarmiĝas.
Preferu vi alveni kaj brakumi en la buduaro
vian amindan kaj abomenindan vian
ol haste fari la geedzan doton por preparo.
Eĉ se la dot' ne pretos ĝustatempe
Kio pli gravas ol la nuna jovialo?

天净沙

1. 春

春山暖日和风，阑干楼阁帘栊，杨柳秋千院中。啼莺舞燕，小桥流水飞红。

2. 夏

云收雨过波添，楼高水冷瓜甜，绿树阴垂画檐。纱厨藤簟，玉人罗扇轻缣。

3. 秋

孤村落日残霞，轻烟老树寒鸦，一点飞鸿影下。青山绿水，白草红叶黄花。

4. 冬

一声画角谯门，半庭新月黄昏，雪里山前水滨。竹篱茅舍，淡烟衰草孤村。

—laŭ melodio *Pura sablo*

1. Printempe

Suno kaj zefir' varmigas monton primavere,
domon kun fenestkurten' ornamas balustrado.
Korte kreskas salikarboj kaj pendol' svingiĝas enaere,
orioloj ĉirpas kaj hirundoj dance flugas.
Sub ponteto akvo fluas, floroj falas jen leĝere.

2. Somere

Post pluv' leviĝas akvo de ondanta la rivero,
ĉe alta domo fridas akvo kaj melono dolĉas.
Arbombro verda kloŝas sur pentrita la alero,
sur mat' en kulvualo sidas belulin' en silko
svinganta rondan ventumilon kun leĝero.

3. Aŭtune

Super vilaĝo ruĝaj nuboj lumas ĉe vespero,
en kuirfumo korvoj flugas ĉirkaŭ l' olda arbo.
Sovaĝanser' el foro fendas nubojn tra l' ĉielo.
Inter kristala akv' kaj verdaj montoj blankaj herboj,
orflavaj floroj, kaj folioj ruĝaj pompas jen kun belo.

4. Vintre

Korno sonas sur gvatturo,
la lunlum' sterniĝas en duonon de la halo.
Antaŭ l' mont' neĝeroj fluas en akv-lulo.
Heĝo el bambu' kaj pajla la kabano
en vilaĝo izolita banas sin de nebulo.

沉醉东风

渔夫

黄芦岸白苹渡口，绿柳堤红蓼滩头。虽无刎颈交，却有忘机友，点秋江白鹭沙鸥。傲杀人间万户侯，不识字烟波钓叟。

Fiŝisto

—laŭ melodio *Ebria en orienta vento*

Ĉe bordo kreskas flavaj la fragmitoj,
la blankaj lemnoj flosas ĉe prameja rando.
Salikoj verdaj staras sur la digo,
sableje vicas ruĝaj poligonoj en rubando.
Kvankam dumviva amikaro mankas al mi,
mi havas la kompanojn sen artifiko.
Ardeoj, sablomevoj flugas super la rivero en aŭtuno.
Mi malestimas tiujn lordojn jen sen kvalifiko.
Malklera la fiŝisto male vivas ja libere,
la mondon trivialan nekonante vere.

姚燧 (1238-1313)

醉高歌

感怀

十年书剑长吁，一曲琵琶暗许。月明江上别湓浦，愁听兰舟夜雨。

Yao Sui (1238-1313)

Rememoro

—laŭ melodio *Kantado en ebrieco*

Mi lamentas longe post dek jaroj
da verkad' kaj militiro.

La muzik' de bivo vibre
donas la promeson per silenta la inspiro.
Kiam mi veturas for de l' urbo ĉe rivero,
triste mi en la boat' aŭskultas
al pluvbatoj en pelmelo.

凭阑人

寄征衣

欲寄君衣君不还，不寄君衣君又寒。寄与不寄间，妾身千万难。

Sendado de vintraj vestaĵoj

—laŭ melodio *Homo sin apoganta al balustrado*

Mi volas sendi al vi vintran veston,
sed timas, ke vi ne revenos, ho sinjoro.
Se mi ne sendos, mi ja timas,
ke vi malvarmon sentos vintre en rigoro.
Ve, malfacile por mi veni al decido,
ĉu sendi aŭ ne, heziteme en ĉi horo.

阳春曲

笔头风月时时过，眼底儿曹渐渐多。有人问我事如何，人海阔，无日不风波。

—laŭ melodio *Kanto de printempo*

Jam forpasis mia kariero
de verkad' pri l' lun' kaj vento,
kaj pliiĝas miaj idoj ja en splendo.
Iu ĉuas, kiel statas mia hejmafero,
Mi respondas, ke vastegas mare l' homa mondo
kaj neniam ne leviĝas ajna ondo.

庾天賜 (? -?)

雁儿落过得胜令

(一) 雁儿落

从他绿鬓斑，欹枕白石烂。回头红日晚，满目青山研。

(二) 得胜令

翠立数峰寒，碧锁暮云间。媚景春前赏，晴岚雨后看。开颜，玉盏金波满。狼山，人生相会难。

Yu Tianci (?-?)

De *Flugfalanta sovaĝansero* al *Kanto de venko*

1. —laŭ melodio *Flugfalanta sovaĝansero*

Nigraj haroj jam fariĝis grizaj

kaj sub mia kap' la ŝtona kapkuseno

ankaŭ eluziĝis ĝis pecetoj.

Kiam mi returnas kapon kun ĉagreno,

suno sinkas kaj ruĝigas la ĉielon ĉe vespero,

verdaj montoj fadas el vidkampa sceno.

2. —laŭ melodio *Kanto de venko*

Smeraldaj montpintoj jen staras en frosto,

pli verdas la montoj ŝlositaj en nuba nebulo.

Necesas apreci pejzaĝon la belan printempe,

rigardi sunplenajn la holmojn post pluva saturo.

Kun ĝoja mieno

ni levu pokalon por drinki vinon kun plezuro.

Sur monto

malofte ni povas ja kuni en ĉarma naturo.

刘敏中 (1243-1318)

黑漆弩

村居遣兴

长巾阔领深村住，不识我唤作伧父。掩白沙翠竹柴门，听彻秋来夜雨。闲将得失思量，往事水流东去。便宜教画却凌烟，甚是功名了处。

Liu Minzhong (1243-1318)

Laŭvola skribaĵo en vilaĝo

—laŭ melodio *Lakita nigra arbalesto*

Loĝante en lontana la kamparo,

mi vestas min per burnus' kaj larĝa kolumparo.

Min prenas nekonat' por kruda vilaĝano.

Jen kreskas ĉe la pordo de l' kabano

bambuoj verdaj sur la blanka sablo.

Tranokte mi aŭskultas al pluv-ŝvabro.

Mi pesas gajnon, perdon en libera tempo,

kalkulas malmeriton kaj meriton en kontemplo.

Paseoj miaj fluas rivere sen spuro,
Eĉ se portreto mia pendas sur la honor-muro,
jam mia glor' troviĝas en obskuro.

马致远 (约 1250 – 约 1321)

天净沙

秋思

枯藤老树昏鸦，小桥流水人家，古道西风瘦马。夕阳西下，断肠人在天涯。

Ma Zhiyuan (ĉ. 1250 — ĉ. 1321)

Aŭtuna penso

—laŭ melodio *Pura sablo*

Trovas sin nur oldaj arboj, grizaj korvoj,
kaj eĉ velkintaj lianoj;
ĉe malgranda ponto kaj fluanta roĵo
staras jen kelkaj kabanoj;
sur antikva vojo trenas sin ĉevalo
magra en uesta vento.
Mondorande vagas kor-rompita homo,
sinkas sun' en okcidento.

(trad. Minosun)

寿阳曲

潇湘夜雨

渔灯暗，客梦回。一声声滴人心碎。孤舟五更家万里，是离人几行清泪。

Nokta pluvo en Xiaoxiang

—laŭ melodio *Kanto pri longviva suno*

Dum flagras la lantern' en fiŝboato,
el sonĝ' vekigis mi.
Rompiĝas mia koro pro gutado
de pluvo en pasi'.
Ĉe mateniĝo, dista dekmil liojn
for de la famili',
mi verŝas purajn larmojn afliktite
kaj en melankoli'.

(trad. Minosun)

夜行船

(一) 秋思

百岁光阴如梦蝶，重回首往事堪嗟。今日春来，明朝花谢。急罚盏夜阑灯灭。

(二) 【乔木查】想秦宫汉阙，都做了蓑草牛羊野。不恁么渔樵无话说。纵荒坟横断碑，不辨龙蛇。

(三) 【庆宣和】投至狐踪与兔穴，多少豪杰。鼎足虽坚半腰里折，魏耶？晋耶？

(四) 【落梅风】天教你富，莫太奢。无多时好天良夜。看钱儿硬将心似铁，空辜负锦堂风月。

(五) 【眼前红】日又西斜，疾似下坡车。晓来清镜添白雪，上床与鞋履相别。休笑鸠巢计拙，葫芦提一向装呆。

(六) 【拨不断】名利竭，是非绝。红尘不向门前惹，绿树偏宜屋角遮，青山正补墙头缺，更那堪竹篱茅舍。

(七) 【离亭宴煞】蛩吟罢一觉才宁贴，鸡鸣时万事无休歇。争名利何年是彻？看密匝匝蚁排兵，乱纷纷蜂酿蜜，闹攘攘蝇争血。裴公绿野堂，陶令白莲社。爱秋来时那些：和露摘黄花，带霜烹紫蟹，煮酒烧红叶，想人生有限杯，浑几个重阳节？人问我顽童记者：便北海探吾来，道东篱醉了也。

Nokta ŝipvojaĝo

(1) —laŭ melodio *Aŭtuna penso*

Kiel sonĝo flugis la centjara vivotempo;
se retrorigarde, ja veindas la paseo.

Venas hodiaŭ printempo;
morgaŭ sonas flora veo.

Ho, rapidu al drinkludo, ĝis lampa pereol!

(2) —laŭ melodio *Arbo kun densaj folioj*

La palacoj de Qin kaj Han,
ĉiuj iĝis, por bovoj kaj ŝafoj, la herbejo.
Se ne tiel, kion do kampuloj pribabilas?
Restas dezertecaj tombo kaj steleo,
tamen la surskribo jam senbrilas.

(3) —laŭ melodio *Celebrado de la regno*

Estis kiom da herooj?
Sed l' enterigejo nun kieas?
Ili aliiĝis jen kaŝejen,
kie bestoj sovaĝaj aleas.
La Tri Regnoj, jes potencaj,
sed fiaskis duonvoje.
Ĉu nun restas la Wei-dinastio,
aŭ l' Jin-dinastio? Ho ve!

(4) —laŭ melodio *Falantaj umefolioj*

Pri mon' ne estu tro avara
eĉ se l' Ĉielo vin favoras!
Do sciu, ke la tempo belas,
sed baldaŭ ne plu por vi floras.
Ho, avarulo, kun la koro
obstina, riĉon persiste adoras
kaj, sen kapablo vere ĝui

plezuron, pri la viv' rigoras.

(5) —laŭ melodio *Ruĝo antaŭ okuloj*
Subiras ree l' suno okcidenten, tiel
rapide, kiel ĉaro surdeklive irus kure.
Kiam vi ellitiĝas en mateno,
aperas blankaj haroj enspegule;
vespere, vi jam adiaŭas
la ŝuojn, kuŝas enlite mortule.
Ne ridu pri la turto, kiu
okupas pigan neston eĉ uzure,
kaj kiu ĉiam sin ŝajnigas
stultule, sed ĝuante ja plezure.

(6) —laŭ melodio *Nerompita fadeno*
Seniĝis famo kaj profito,
sekve finiĝas ne' kaj jeso:
aferoj ĝenaj en la homa mondo
ne plu vekas min al intereso;
ĉi pajlkabanon milde ombras
helverdaj pino kaj cipreso;
grizblua mont' plenigas ĝuste
la murajn breĉojn en impresio.
Jen tiu ĥato ĉirkaŭita de plektobarilo
bambua, kiu min favoras kun kareso!

(7) —laŭ melodio *Festeno ĉe la adiaŭ-dira pavilono*
Nun oni povas dormi
trankvile, kiam nokte ĉirpas grilo;
de kiam koko krias,
konkursas ĉio en senĉesa iro.
Kiam al fino venos
ĉasado pri renomo kaj pagilo?

Ni vidu:
Formikoj por nutraĵo vice en amas' defilas,
abeloj zume okupiĝas pri mielfarado,
la sangon muŝoj vete suĉ-altiras.

Jen estas sopirendaj la vilao verda
de Pei Du kaj la societo de Tao Yuanming*:
Ĉe l' alveno de l' aŭtuno am-oferta
krizantemajn florojn rose pluk-akiri,
krabojn violruĝe prujnitajn kuir

per folioj rufaj, kaj brandon distili.

Ni pensu:

Kiom da vinglasoj restas por la vivodaŭro?

Kiom da oldulaj festoj estos sen bedaŭro?

Mi dirus al infanoj miaj, ke memoru vi:

eĉ kiam Kong Rong** venus min viziti,

mi ne akceptus lin; kaj vi parolus nur al li,

ke estas mi ebria por ermiti.

**Pei Du (766 – 839) estis distingita politikisto kaj literaturisto, kaj en sia maljuneco, pro la obskuro de la regado, konstruigis la vilaon “Halo Kampe Verda” kiel ermitejon. Tao Yuanming (ĉ.352 – 427), plej fama pastorala poeto, kiu iam aliĝis, por esti ermito, al la budhista societo “Blanka Lotuso”, fondita de la Majstro Hui Yuan.*

***Kong Rong (153 – 208), famkonata kiel saĝulo kaj literaturisto, kiu iam diris: “Se gastoj plenas en la halo, kaj se mia vinglaso ne estas vaka, mi jam restos senzorgema.”*

(trad. Minosun)

四块玉

恬退

酒旋沽，鱼新买。满眼云山画图开，清风明月还诗债。本是个懒散人，又无甚经济才。归去来！

Esti kontenta en ermitado

—laŭ melodio *Kvar pecoj de jado*

Urĝe mi aĉetis freŝajn fiŝojn

kaj havigis al mi vinon haste.

Vidas mi pejzaĝon de montaro

en nebulo ruliĝanta vaste,

kaj en brila lun’, kun venta mildo,

daŭrigas versi senprokraste.

Propre mi ne estas diligenta,

por la homa mond’, nek kompetenta,

kaj preferu ermiti kontenta.

(trad. Minosun)

四块玉

叹世

(一) 带野花，携村酒，烦恼如何到心头。谁能跃马常食肉？二顷田，一具牛，饱后休。

(二) 佐国心，拿云手，命里无时莫刚求。随时过遣休生受。几叶绵，一片绸，暖后休。

(三) 戴月行，披星走，孤馆寒食故乡秋。妻儿胖了咱消瘦。枕上忧，马上愁，死后休。

Lamentoj pri la mondo

—laŭ melodio *Kvar pecoj de jado*

(1)

Kiel povus veni koren la ĉagreno,
se vi estus kun floro sovaĝa
kaj vino vilaĝa?
Kiu povus ĉiam resti en la beno:
sur ĉevalo luksa sin reteni
kaj nutraĵon fajnan preni?
Unu bovo, du parceloj
jam sufiĉas sen malsat-suferoj.

(2)

Sen la ambicio regnon paca teni,
sen la forta volo nubojn mane preni,
vi do ne eltrudu tion malgraŭvole.
Vivu laŭnature kaj senzorge,
liberiĝu de sufero memkonsole.
Kelkaj pecoj da brokato kaj sateno,
vere kontentigas por varm-teno.

(3)

Sub la luno kaj stelaro mi marŝadas,
en gastejo loĝas sole,
kaj malvarman manĝon prenas.
Mi aŭtune magras senkonsole,
dum edzino kaj gefiloj miaj
eĉ fariĝas grasaj pretervole.
Afliktiĝas mi sur kapkuseno,
surĉevale tristas eĉ strangole.
Ĉio vaporiĝos,
kiam mortos mi izole.

(trad. Minosun)

赵孟頫 (1254-1322)

后庭花

秋思

清溪一叶舟，芙蓉两岸秋。采菱谁家女，歌声起暮鸥。乱云愁，满头风雨，戴荷叶归去休。

Zhao Mengfu (1254-1322)

Pensoj en aŭtuno

—laŭ melodio *Floro en malantaŭa korto*

Ŝi remas folieskan la boaton
sur klara rivereto borderita
per lotusoj en aŭtun-nuanco.
Kies knabino estas ŝi, en la veteo frida?

Ŝi kantas, panikante mevojn en krepusko.
Tumultas nuboj, venas pluv' subita.
Ŝi kovras sian kapon per lotusfolio
kaj remas hejmen laŭ akvfuo glita.

王实甫 (1260-1336)

十二月过尧民歌

别情

(一) 十二月

自别后遥山隐隐，更那堪远水粼粼。见杨柳飞絮滚滚，对桃花醉脸醺醺。透内阁香风阵阵，掩重门暮雨纷纷。

(二) 尧民歌

怕黄昏忽地又黄昏，不销魂怎地不销魂。新啼痕压旧啼痕，断肠人忆断肠人。今春，香肌瘦几分？缕带宽三寸。

Wang Shifu (1260-1336)

De *Dekdua monato* al *Folkloro kanto*

Ĉagreno de disiĝo

1. —laŭ melodio *Dekdua monato*

De kiam vi foriris,
jam montoj kun vi malaperis for.
Kiel mi povus jen toleri vidi
l' ondantan akvon flui kun ignor'
kaj salikflokojn flirti kun petol'
kaj fronti rozvangajn persikflorojn?
Arom' invadas per penetra bor'
en mian buduaron jen kaj jen,
krepuska pluvo batas kun rigor'
firme fermitajn pordojn violente,
ĉu vi ja scias, mia amata sinjor'?

2. —laŭ melodio *Folkloro kanto*

Kvankam timas mi vesperkrepuskon,
tamen ĝi frekventas re kaj re.
Ho, animo mia ja raviĝis,
sed tuj la ekzalto iras al pere'.
Nova larmmakulo kovras la malnovan,
korŝirita hom' sopiras la alian foran, ve!
Kiam ĉi printempo venas,
mia delikata haŭto jam ŝrumpiĝas multe
kaj la zono lozas ĉirkaŭ l' korpo magriĝinta tre!

邓玉宾（约 1294）

明明令

道情

一个空皮囊包裹着千重气；一个干骷髅顶戴着十分罪。为儿女使尽些拖刀计，为家私费尽些担山力。你省的也么哥，你省的也么哥，这一个长道理何人会？

Deng Yubin (vivanta ĉ.1294)

Lamento pri sorto

—laŭ melodio *Babilema kanto*

Via haŭto volvas vian korpon
kiu nur entenas aeron plus aero;
viaj sekaj ostoj portas pekojn
kaj deliktojn tute sen espero.

Vi penegas por gefiloj viaj
ĉiurimedede de mateno ĝis vespero,
kaj elspezas ĉiujn viajn fortojn
por la familia kosto tra sufero.

Ĉu vi ja komprenas mian kanton?

Ĉu vi ja komprenas mian kanton?

Ne agadu stulte pro la longa vivo en libero!

阿利西瑛（约 1320）

殿前欢

懒云窝

懒云窝，醒时诗酒醉时歌。瑶琴不理抛书卧，无梦南柯。得清闲尽快活，日月似撺梭过，富贵比花开落。青春去也，不乐如何？

Ali Xiying (vivanta ĉ. 1320)

Mia nesto nomata Pigra Nubo

—laŭ melodio *Ĝojo antaŭ palaco*

En mia nesto *Pigra Nubo*
mi drinkas kaj vers-verkas dum mensklara;
ebriiĝante, mi kantadas laŭte.

Nek legas nek liuton ludas mi neniofara,
nek revas grimpi al altrango.

Plezure vivas mi kun koro joviala,
lasante tempon pasi for navede.

Riĉec' kaj famo kiel kresk' florara,
jen pompas jen velkiĝas.

Senspure malaperis jam juneco kara,
Kion mi povas fari, se mi
ne ĉasus ĝojon en realo pala?

冯子振 (1253-1348)

鹦鹉曲

山亭逸兴

嵯峨峰顶移家住，是个不唧溜樵父。烂柯时树老无花，叶叶枝枝风雨。故人曾唤我归来，却道不如休去。指门前万叠云山，是不费青蚨买处。

Feng Zizhen (1253-1348)

Ermita plezuro en pavilono de la monto

—laŭ melodio *Ario de papago*

Mi jam translogiĝis al apika montopinto
kaj fariĝis la novico en lignhaka metio.
Ĉiutage goas mi ĉe olda arbo ega,
kiu akompanas min, sed sen disflor-magio.
Ĝiaj branĉoj kaj folioj povas ne rezisti
kontraŭ pluvo kaj ventpelo sen defio.
Malnova amik' persvadis al mi jen reveni
al ofico en palaco, tamen mi kun apatio
al kortega rango restas en la monto.
Antaŭ l' pord' min montoj ravas en ebrio.
Ĉu aĉeti povus oni ja per mono
la pitoreskejon kun flosanta nuboj en vario?

鹦鹉曲

别意

花骢嘶断留依住，满酌酒劝据鞍父。柳青青万里初程，点染阳关朝雨。怨春风雁不回头，一个个背人飞去。望河桥敛衽频啼，早暮到长亭短处。

Ĉagreno de disiĝo

—laŭ melodio *Ario de papago*

Ĉevalo henas kvazaŭ por reteni vin,
mi ne sukcesas per plentas' da vin'
restigi vin sur la ĉevalo preta iri.
Salikoj verdaj vidas vin formarŝi kun obstin'
sur voj' de dekmil lioj, kaj l' Pasejo Yangguan,
sin banas en matena pluv' en malproksim'.
Mi plendas en printempa vento, kial
sovaĝanseroj ja forflugas laŭ rutin'
unu post alia sen returni kapon.
Kun vest' malsekigita de larmgutoj,
mi trovas pavilonon de disiĝ' en fin'.

朱帘秀（? —?）

寿阳曲

答卢疏斋

山无数，烟万缕。憔悴煞玉堂人物。倚篷窗一身儿活受苦，恨不得随大江东去。

Zhu Lianxiu (?-?)

Respondo al Lu Zhi

—laŭ melodio *Kanto pri longviva suno*

Sennombraj montoj vualitaj

per dekmil strioj de nebulo.

Jam magra vi fariĝas, ve, sinjoro,

dum mi apogas min al la fenestro sen plezuro.

Mi vere volus ĵeti min en la riveron

kaj flui orienten en akv-rulo.

贯云石（1286–1324）

塞鸿秋

代人作

战西风几点宾鸿至，感起我南朝千古伤心事。展花笺欲写几句知心事，空教我停霜毫半晌无才思。往常得兴时，一扫无瑕疵。今日个病厌厌，刚写下两个相思字。

Guan Yunshi (1286-1324)

Skribita por amiko

—laŭ melodio *Aŭtuna sovaĝansero super landlimo*

En la okcidenta vent' videblas

kelkaj punktoj de sovaĝanser-linio.

Tio vekas ĉe mi l' rememoron

pri pereo ĉagreniga de la Suda Dinastio.

Sur paper' mi volas skribi varmajn vortojn,

sen inspir' mi devas demeti skribilon kun ĝemkrio.

En humoro ĝoja povis mi sukcesi

versi tutperfekte jen sur plena la paperfolio.

Nun mi ŝajnas malsanema kaj nur unu vorton

mi surpaperigas "amsopiro", ve, en nostalgio.

寿阳曲

新秋至

新秋至，人乍别，顺长江水流残月。悠悠画船东去也，这思量起头儿一夜。

—laŭ melodio *Kanto pri longviva suno*

Aŭtuno nova ĵus alvenas,

disiĝis jam ni unu de l' alia.

Sub luno malkreskanta

forfluis orienten laŭ l' river', boato via.

Ĉi-nokte estas la unua fojo,
kiam sopiras mi al vi kun sento nostalgia.

红绣鞋

挨着靠着云窗同坐，偃着抱着月枕双歌，听着数着愁着怕着早四更过。四更过情未足，情未足夜如梭。天哪，更闰一更儿妨甚么！

—laŭ melodio *Ruĝaj broditaj ŝuoj*
Alpremante unu kun alia
sidas ni ĉe la fenestro kun intim'.
Nestas mi en viaj brakoj en la lito,
sur la kapkusen' ni zumas kanton sen deprim'.
Mi tre timas, ke la nokt' rapide pasos,
sed ni ne ankoraŭ ĝuas amon sen abstin'.
Malkontenta ĝuo, nokt' mallonga!
Ho, Ĉielo! Kial vi ne plilongigas nokton
je pli da tempdaŭr' laŭ nia korinklin'?

蟾宫曲

送春

问东君何处天涯，落日啼鹃，流水桃花。淡淡遥山，萋萋芳草，隐隐残霞。随柳絮吹归那答，趁游丝惹在谁家？倦理琵琶，人倚秋千，月照窗纱。

Adiaŭado al printempo

—laŭ melodio *Ario de luna palaco*
Mi demandas al la Dio Orienta,
kie estas limo de l' ĉielo?
Ĉe la sunsubir' kukoloj ĉirpas,
la falintaj persikfloroj fluas laŭ l' rivero,
foraj montoj svagas en konturo,
herboj kreskas en prospero,
徐再思 (约1320—?)

普天乐

垂虹夜月

玉华寒，冰壶冻。云间玉兔，水面苍龙。酒一樽，琴三弄。唤起凌波仙人梦，倚阑干满面天风。
楼台远近，乾坤表里，江汉西东。

Xu Zaisi (ĉ. 1320—?)

Luno super ĉielarko

—laŭ melodio Ĝojo sub la tuta ĉielo

La luno fridas,

la poto glaciĝas.

En nubo jad-leporoj kur-rapidas,

surakve blua drak' skiiĝas.

Pokalo da alkoholaĵ' en mano,

arioj tri de la liuto por balzamo.

Mi veku la feinon el la sonĝo bela

por ke ŝi venu per la paŝ' etera.

Apogante min al balustrado,

mi karesatas de la venta delikato.

Palacoj, pavilonoj foraj kaj proksimaj,

la tero kaj l' ĉielo alta aŭ malalta,

riveroj okcidentaj kaj eostaj,

jen ĉiuj falas al mi en la kamp' rigarda.

喜春来

皇亭晚泊

水深水浅东西涧，云去云来远近山。秋风征棹钓鱼滩，烟树晚，茅舍两三间。

Ankriĝo dum nokto

—laŭ melodio *Bonvenigo al la printempo*
Akv' en rojoj okcidentaj kaj eastaj
fluas same sen vari',
nuboj sur proksimaj kaj lontanaj
ŝvebas same kun magi'.
La aŭtuna vento pelas la boaton
al la benk' kun fiŝ-soci'.
Arboj vualatas de nebulo ĉe vespro,
nur vidiĝas du-tri plajkabanoj en malhelo.

蟾宮曲

江淹寺

紫霜毫是是非非，万古虚名，一梦初回。失又何愁？得之何喜？闷也何为？落日外萧山翠微，小桥边古寺残碑。文藻珠玑，醉墨淋漓。何似班超，投却毛锥？

Templo de Jiangyan

—laŭ melodio *Ario de luna palaco*
Mi skribas pri la pravo kaj malpravo
per la penik' supera.
Multjara vanta la renom' nuliĝas
kvazaŭ en song' fabela.
Kian ĉagrenon vi ekhavas
se jam perdiĝis ĝi sen spuro?
Kian ĝojegon vi ekhavas
se vi ĝin gajnas kun plezuro?
Kiel utilas via spleno pri ĝi
en via vivo de futuro?
Ekster la subiranta suno
ankoraŭ montoj en nebul' berilas.
Apud la pont' senŝanĝe antaŭ l' templo
steleoj damaĝitaj jen spaliras.
Eĉ se brilantaj vortoj viaj
similas al perloj de valoro,
kaj skribas vi eseojn bonajn
per ink' vivplena kun fervoro,
kiel vi povus vin kompari
kun la talenta Ban Chao*, kun alt-ambicio,
kiu forĵetis plumon por milito kun pasio.

**Ban Chao (32-102) estas granda strategiisto en antikva Ĉinio.*

蟾宫曲

春情

平生不会相思，才会相思，便害相思。身似浮云，心如飞絮，气若游丝。空一缕余香在此，盼千金游子何之？证候来时，正是何时？灯半昏时，月半明时。

Nostalgio en printempo

—laŭ melodio *Ario de luna palaco*

Antaŭe mi ne konis,
Kio ja estas la sopir' al am'.
Kiam mi ĝin ekkonas,
mi tuje falas en ĝin jam:
la korpo kiel la flosanta nub' en la ĉielo,
la koro kiel la flirtanta salikfloko,
la spiro kiel la filandro en aero.
Mi nur forlasas vane aromstrion tie ĉi,
Kiam aperos la vaganto nobla—ho, jen mi?
Kiam alvenas mia sopirem',
ĉu povas mi ekkapti la okazon mem?
Ĝi venas en lamplumo kun malhel'
aŭ kiam lun' duone brilas en aper'.

水仙子

夜雨

一声梧叶一声秋，一点芭蕉一点愁，三更归梦三更后。落灯花，棋未收，叹新丰孤馆人留。枕上十年事，江南二老忧，都到心头。

Nokta pluvo

—laŭ melodio *Kanto pri narciso*

Mi aŭdas la aŭtunan veon sur foli' platano,
kaj batojn sur baŝofolio de pluvguta ĝeno.
Noktmeze sonĝas mi jen pri hejmenreveno.
Brulaĵo el lampmeĉo falas kiel glano,
ŝakpecoj kuŝas sur tabulo en disordo.
Lamentas mi nun pri restado en gastejo.
Sur kapkusen' min kaptas ĉagren-mordo
de la dekjaraj pasintaĵoj en kirliĝo.
Gepatroj oldaj nun loĝantaj sude de l' rivero
aperas ja denove en la menso kun leĝero.

水仙子

春情

九分恩爱九分忧，两处相思两处愁，十年迢递十年受。几遍成几遍休，半点事半点惭羞。三秋恨三秋感旧，三春怨三春病酒，一世害一世风流。

Amo en printempo

—laŭ melodio *Kanto pri narciso*

Mi estas tiom amsopira kiom ĉagrenplena;
ni korinklinas en du lokoj unu al alia.
Dek jarojn amas ni kun samlonga ĝen' korĝema,
kelkfoje ni suferis de la gajn' kaj perdo senracia.
Duono da afer' neniam portas jen al mi
neniom da hontemo kaj rimorso senkonsola.
En la aŭtun' mi sentas haton sen konsci'
kaj kovas la pasintan ĝojon en la fundo kora.
Printempo kaptas min per senlima plendo,
mi dronas en alkoholaĵo ĝis ebrio.
Pro tio mi magriĝas, malsaniĝas en serio,
sed mi ne povas liberiĝi de flirtema sento.

人月圆

甘露怀古

江皋楼观前朝寺，秋色入秦淮。败垣芳草，空廊落叶，深砌苍苔。远人南去，夕阳西下，江水东来。木兰花在，山僧试问，知为谁开？

Ĉe l' templo Dolĉa Roso

—laŭ melodio *Rondiĝo de luno kaj homoj*

Ĉe la rivero staras templo Dolĉa Roso
volvita de aŭtuna la etoso.
Ruinigitaj muroj sidas en herbar' kun bonodoro,
la falfolioj dise kuŝas en la vaka koridoro,
invadas verda musk' ŝtonŝtupojn agreseme,
turistoj jam foriris ne plu senrevene.
La suno sinkas okcidenten,
la riverakvo fluas orienten.
Nur magnoliaj floroj pompas tie,
mi ĉuas al la bonzo emocie,
por kiu l' floroj jen prosperas simpatie.

朝天子

西湖

里湖，外湖，无处是无春处。真山真水真画图，一片玲珑玉。宜酒宜诗，宜晴宜雨。销金锅锦绣窟，老苏，老逋，杨柳堤梅花墓。

Okcidenta Lago

—laŭ melodio *Kanto pri l' filo de l' Ĉielo*

Interna Lago kaj Eksterna Lago
plenplenas je la vidindaĵoj de la primavero.
La rojoj kaj la montoj—veraj la pentraĵoj—

ja superbelas jadajn nubojn sur ĉielo.
Ĝi estas bona loko por versado kaj drinkado,
egalas, ĉu en la sunplena tago, ĉu en pluv-vetero.
Ĝi jen similas al kaldrono,
en kiun oni ĵetas oron en prodiga maniero,
ĝi ankaŭ estas la scenejo,
sur kiu la satenaj vestoj montras sin en belo.
Poeto Su* kaj ume-amanto Lin Bu**,
vi povas trovi l' Dig' Salika en honoro al Su
kaj Tomb' de Umefloroj por Lin sur mont-tero.

**Su aludas al Su Shi (1037-1101), kiu havas grandan renomon en la ĉina antikva literaturo.*

***Lin Bu (967-1028) estas fama poeto de Song-dinastio de Ĉinio.*

查德卿（约 1317 在世）

一半儿

春妆

自将杨柳品题人，笑捻花枝比较春，输与海棠三四分。再偷匀，一半儿胭脂一半儿粉。

Zha Deqing (vivanta ĉ. 1317)

Printempa tualetto

—laŭ melodio *Duono kaj duono*

Ŝi provas sin kompari kun salika arbo,
prenante vergon ŝi, kun rideto,
intencas vidi, kiu estas vera printempaĵo.
Trovinte, ke ŝi estas linda en koketo
sed malpli ol la begonia floro,
refoje ŝi sin ŝminkas jen en tualetto,
kaj pudras vangojn, ruĝas lipojn por dekoro.

柳营曲

金陵故址

临故国，认残碑，伤心六朝如逝水。物换星移，城是人非，今古一枰棋。南柯梦一觉初回，北邙坟三尺荒堆。四围山护绕，几处树高低。谁，曾赋黍离离。

Antikva ĉefurbo Jinling

—laŭ melodio *Kanto de salika kampadejo*

Mi venas al l' ĉefurb' antikva
kaj vidas la kaputajn murojn nur.
Je mia ĉagreniĝ' Ses Dinastioj
jam pasis kiel riverfluo en forkur'.
Objektoj restas samaj, tamen steloj
moviĝas rivele tag' post tago.
La historio estas nura raŭndo de ŝakludo,
ni jam vekiĝis el la sonĝo de imago.

Sur norda mont' ni kuŝos en mortduno,
de holmoj ĉirkaŭata jen je flankoj kvar
kaj arboj altaj kaj malaltaj tie kaj ĉi tie.
Kiu atentis pri la ter' sovaĝa en ĝangal'?

唐毅夫（约 1317 在世）

一枝花

（一）怨雪

不呈六出祥，岂应三白瑞。易添身上冷，能使腹中肌。有甚稀奇，无主向沿街坠，不着人到处飞。暗敲窗有影无形，偷入户潜踪蹑迹。

（二）梁州

才苦上茅庵草舍，又钻入破壁疏篱。似杨花滚滚轻狂势。你几曾见贵公子锦裯绣褥？你多曾伴老渔翁箬笠蓑衣？为飘风胡做胡为，怕腾云相趁相随。只着你冻的个孟浩然挣挣痴痴，只着你逼的个林和靖钦钦历历。只着你阻的个韩退之哭哭啼啼。更长，漏迟。被窝中无半点儿阳和气，恼人眠，搅人睡。你那冷燥皮肤似铁石，着我怎敢相偎。

（三）尾

一冬酒债因他累，千里关山被你迷。似这等浪蕊闲花，也不是久长计。尽飘零数日，扫除做一堆，我将你温不热薄情化做了水。

Tang Yifu (vivanta ĉ. 1317)

—laŭ melodio *Branĉo da floroj*

1. Plendo pri neĝo

La neĝo havas florojn kun petaloj ses,
ĉu ĝi promesas riĉan la rikolton de la gren'?

Alportas ĝi malvarmon al la korpo
kaj malsatigi l' ventron kun ĉagren'.

Ĉu ĝi mirindas?
Ĝi flirtas super stratoj jen kaj jen,
sencele flugas tien kaj ĉi tien.

Je la fenestro frapas ĝi per ajna ĝen',
Ŝteliras nevideble ĝi en domon
tra l' pord' lasante ombron de malplen'.

2. —laŭ melodio *Kanto pri batalkampo*

Vi ĵus grimpis sur tegmenton de pajlokabano,
nun penetras vi en heĝon kaj la muron tra la fendo,
kiel salikflokaj flirtas kun grimaco de minaco.

Ĉu vi vidis dandan silkan robon ja kun splendo?
Ĉu vi alkroĉiĝis al pajlomantelo de fiŝisto olda?

Vi malbonojn faras surrajdante sur la furioza vento,
kune kun ŝvebantaj nuboj sur ĉielo.

Vi ne zorgas, ke eĉ poem-majstr' frostiĝu kun lamento,
vi eĉ l' umeflor-amanton jen tremigas pro malvarmo.

Nur vi povas bari l' vojon de pasanto per impertinento.

Nokto longas sintreneme,
la tagiĝ' alvenas lante kun indiferento.
Mia litkovril' ne donas iom da varmeto.
Vi min ĝenas kaj min maldormigas per anksia sento.
Via haŭto fridas kaj malmolas kiel fero,
kiel povus mi alpremi min al via sino kun kontento?

3. —laŭ melodio *Epilogo*

Tra la vintro mi ne pagas ŝuldon de likvoro,
mi ne povas iri hejmen pro blokado via
sur la vojo de mil kaj mil lioj ĝis la foro.
Vi senfrukta floro, kvankam flosadante ĉie,
ne longe daŭros nek fuŝ-ludas kun petolo.
Mi finfine vin balaos en amason, vin varmigis
kaj dissolvos vin en larmojn, ho, de via ploro.

朱庭玉 (? — ?)

天淨沙

秋

庭前落尽梧桐，水边开彻芙蓉。解与诗人意同。辞柯霜叶，飞来就我题红。

Zhu Tingyu (? — ?)

Aŭtuno

—laŭ melodio *Pura sablo*

Platanfolioj falas plene en la korto,
enakve lotusfloroj fadas en koloro.
Verŝajne ili konas mian penson,
kaj flugas de la branĉoj, kun favoro,
kun ruĝ' farbita de la prujno,
malsupren por min helpi en versad-laboro.

张鸣善 (? — ?)

普天乐

咏世

洛阳花，梁园月，好花须买，皓月须赊。花倚栏干看烂熳开，月曾把酒问团圆夜。月有盈亏花有开谢，想人生最苦离别。花谢了三春近也，月缺了中秋到也，人去了何日来也？

Zhang Mingshan (? — ?)

Lamento pri vivo

—laŭ melodio *Ĝojo sub la tuta ĉielo*

Ho, floroj de Luoyang!
Ho, brila luno super la ĝardeno!
Aĉetitaj esti indas bonaj floroj,
sed brila lun' ne aĉetebblas eĉ per granda peno.

Vi povas spekti floran pompon ĉe la balustrado,
kaj drinkas ĝis rondiĝ' de l' lun' sen ĝeno.
La lun' alterne kreskas kaj malkreskas,
kaj floroj ankaŭ floras, velkas kun viv-sveno.
En homa viv' vin ronĝas plej la sento de disiĝo.
Denove floras floroj je printempa la alveno,
la lun' rondiĝas ree ĉe la Tago Aŭtunmeza.
Sed post disiĝ', kiam vi revenos jen kun ĝoj-mieno?

落梅风

咏雪

漫天坠，扑地飞，白占许多田地。冻杀吴民都是你！难道是国家祥瑞？

Neĝo

—laŭ melodio *Falantaj umefolioj*

Vi flirte falas el ĉielo,
saltete dancas sur la tero,
perforte tenas multe da grenkampoj sub la rego,
kaj vundas popolanojn per frostego.
Ĉu tio estas por la regn' favora la afero?

普天乐

愁怀

雨儿飘，风儿扬。风吹回好梦，雨滴损柔肠。风萧萧梧叶中，雨点点芭蕉上。风雨相留添悲怆，雨和风卷起凄凉。风雨儿怎当，雨风儿定当，风雨儿难当。

Ĉagreno en koro

—laŭ melodio *Ĝojo sub la tuta ĉielo*

Pluvgutoj flirtas kun libero
en vent' blovanta forte.
La vent' forblovas mian songon per kruelo,
la pluv' disrompas mian molan koron.
Tra platanarboj vento hurlas per minaca pelo,
pluvgutoj batas sur baŝfoliojn forte.
La pluv' kaj vento kune naskas triston en aero,
la vent' kaj pluvo levas la ĉagrenon en la koro.
Kiel mi povus kontraŭstari la ventpluvon de ribelo?
Tutcerte ili ja persistas sen foriri,
vole nevole mi eltenas ilin en mizero!

普天乐

嘲西席

讲诗书，习功课。爷娘行孝顺，兄弟行谦和。为臣要尽忠，与朋友休言过。养性终朝端然坐，免教人笑俺风魔。先生道“学生琢磨”。学生道“先生絮聒”。馆东道“不识字由他”。

Mokado pri komika instruanto

—laŭ melodio *Ĝojo sub la tuta ĉielo*
Vi instruas al lernantoj legi, skribi,
ili penas teni viajn instrukciojn en la koro:
obeemi al gepatroj viaj,
bonkondukti al la fratoj sen frivolo;
servi kun fidelo al la reĝo,
ne ĉikani amikaron en parolo;
teni seriozan pozon etikete,
tiel ke vin ne kritikis popolo.
L' instruanto diras al lernantoj:
“Bone vi pripensu sen stuporo.”
Sed respondas la lernantoj:
“Babilaĉas vi, sinjoro!”
La fameliestr' aldonas:
“Lasu ilin agi laŭ la volo.”

杨朝英（? — ?）

水仙子

西湖探梅

雪晴天地一冰壶，竟往西湖探老逋，骑驴踏雪溪桥路。笑王维作画图，拣梅花多处提壶。对酒看花笑，无钱当剑沽，醉倒在西湖！

Yang Chaoying (? — ?)

Umefloroj ĉe l' Okcidenta Lago

—laŭ melodio *Kanto pri narciso*
La ĉielo kaj la tero ŝajnas poto de glaci',
mi do iras serĉi umeflorojn ĉe la lago.
Sur azen' mi tretas neĝan vojon por misi'.
Mi primokas la pentraĵon de l' poeto,
ke ĝi multe malpli bela ol pejzaĝo ĉi.
Umeflorojn plukas mi, jen kaj jen drinkante,
kaj aprecas la inversan bildon kun laŭvola fantazi'
de la floroj sur surfaco de la vino.
Por aĉeti vinon, se ne havas monon mi,
mi volonte vendas mian spadon
kaj glutegas vinon ĉe la lago ĝis ebrj'.

宋方壶（? — ?）

山坡羊

道情

青山相待，白云相爱，梦不到紫罗袍共黄金带。一茅斋，野花开，管甚谁家兴废谁成败，陋巷箪瓢亦乐哉。贫，气不改；达，志不改。

Song Fanghu (? — ?)

Senĝena sonĝo

—laŭ melodio *Kapro sur montdeklivo*

Verdajn montojn traktas mi intime,
blankajn nubojn amas mi kun korinklino.
Mi ne povas sonĝi pri l' palaca rob' purpura
aŭ la zono ora, sed pri pajl-hato laŭ destino,
kie pompas sovaĝ-floroj tie kaj ĉi tie.
Mi ne zorgas, kiu povras, kiu riĉas ĝis kulmino,
mi eĉ ĝojas pri manĝaĵoj krudaj kaj banala vivo.
Pro malriĉo mi ne malfortiĝas kun kapklino,
Pro riĉiĝo mi ne ŝanĝas volon kun obstino.

清江引

托咏

剔秃鬣一轮天外月，拜了低低说：是必常团圆，休着些儿缺，愿天下有情底都似你者。

Al la luno

—laŭ melodio *Kanto pri klara rivero*

La plenluno rondas tre sur la ĉielo,
mi jen riverencas al ŝi kaj mallaŭte diras:
“Certe ĉiam rondas vi ja en apero,
sed neniam vi malkreskas al mi.
Mi deziras, ke l' amantoj sur la tero
kiel vi inklinas unu la alian kun sincero.”

斗鹤鹑

送别

(一) 落日遥岑，淡烟远浦。萧寺疏钟，戍楼暮鼓。一叶扁舟，数声去橹。那惨戚，那凄楚，恰待欢娱，顿成间阻。

(二) 紫花儿

瘦岩岩香消玉减，冷清清夜永更长，孤另另枕剩衾余。羞花闭月，落雁沉鱼。踌躇，从今后谁寄萧娘一纸书？无情无绪，水淹蓝桥，梦断华胥。

(三) 调笑令

肺腑，恨怎舒？三叠阳关愁万缕。幽期密约欢爱处，动离愁暮云无数。今夜月明何处宿？依依古岸黄芦。

(四) 秃厮儿

欢笑地不堪举目，回首处景物萧疏。星前月下谁共语？谩嗟吁，何如？

(五) 圣药王

别太速，情最苦，松金减玉瘦了身躯。鬼病添，神思虚。心如刀剌泪如珠，意儿里懒上香车。

(六) 尾

眼睁睁怎忍分飞去，痛杀我也吹箫伴侣！不付能恰住了送行客一帆风，又添起助离愁半江雨。

Adiaŭado

—laŭ melodio *Batalo de koturnoj*

1.

Ĉe sunsubiro svagas distaj montoj,
kaj brum' vualas la pramejon en la foro.

La templa sonoriloj batas lante,
tamburo el gvat-turo sonas en ĉi horo.

Boato folieska flosas
kaj glitas foren en izolo.

Ve, kiel trista sceno!

Kia ĉagreno kaj doloro!

La ĵusa renkontiĝo kun plezuro
fariĝas nun disiĝo longa sen konsolo!

2. —laŭ melodio *Violaj floroj*

Mi magriĝas tag' post tago pro sopiro,
frida nokto plilongiĝas ja sen fino,
sola mi kuŝas en lito kun malvarma litkovrilo.

Ĉu la lun' kaj floroj sentus honton
kaj sovaĝanseroj, fiŝoj pro humilo
fuĝus je ekvido de beleco mia?

Mi hezitas sen konsilo.

Ekde nun, kiu sendos al mi letereton?

Splenas mi pro maltrankvilo.

Akv' dronigas Bluan Ponton de amliĝo,
el la sonĝo mi vekigigas kun suspiro.

3. —laŭ melodio *Flirta kanto*

Kiel mi povus moderigi

ĉagrenon en la koro?

Trifoje sonas kanto de disiĝo,
ve, afliktiĝas mi kun kor-doloro.

Ni rendezuis, kveris kun amemo,
des pli min ĝenas tio en malbonhumoro.

Kie haltigos la boaton vi ĉi-nokte
por nokti sub lun-gloro?

Ĉu vi sopiras al mi en izolo

ĉe fragmitejo apud bordo en dorm-horo?

4. —laŭ melodio *Kalva kapo*

Mi ne kuraĝas ĵeti ekrigardon
al lokoj, kie ni ludis kun plezuro.

Sub la stelbril' kaj lunlumo,

kun kiu kverus mi nun en murmuro?

Mi frotas manojn kun suspiro,
kion mi faru en futuro?

5. —laŭ melodio *Sankta reĝo de drogherboj*

Ne hastu!

Amsento estas plej amara,
ĝi malgrasigas mian jadan korpon.
Malsano mia igas min tre pala,
mi malfortiĝas korpe kaj spirite.
Korŝire afliktiĝas mi kun larmo fala,
mi eĉ ne volus ja ascendi
kaleŝon pro ĉagreno senkompara.

6. —laŭ melodio *Epilogo*

Kiel povus mi toleri la disiĝon?
Apartigi min de vi— ve, mia flutkompan'
dispecigas mian koron jen kruele.
Malfacile adiaŭis vin mi kun ĉagreno jam,
sur river' leviĝas trista pluv' tuj,
kiu ja afliktas min pro alkroĉiĝ' al via am'.

贾固（约 1368 在世）

寄金莺儿

（一）醉高歌

乐心儿比目连枝，肯意儿新婚燕尔。画船开抛闪的人独自，遥望关西店儿。黄河水流不尽心事，中条山隔不断相思。

（二）红绣鞋

当记得夜深沉，人静情，自来时。来时节三两句话，去时节一篇诗，记在人心窝儿里直到死。

Jia Gu (vivanta ĉ. 1369)

Al ora oriolo

1. —laŭ melodio *Kantado en ebrieco*

Kiel platfiŝoj aŭ ĝemelaj branĉoj de la arbo,
ni geedziĝis jen feliĉe je kontento mia.
Boat' foriris, lasis vin tutsola sur la bordo, ho ve!
Mi nur rigardas al pasej' en okcidento sunradia.
Kiel Rivero Flava nia amo daŭre fluas,
De la Meza Monto ne bareblas nia am' pasia.

2. —laŭ melodio *Ruĝaj broditaj ŝuoj*

Ĉu vi memoras, ke en nokto profunda,
homvoĉ' jam mutis plene,
vi venis sola.
Kiam vi venis splene,

vi nur parolis du-tri vortojn.
Kiam foriris, vi mantene
portis de mi poemeton.
Ĝin memorigu ĝis ni mortos svene.

周德清 (1277—1365)

塞鸿秋

浔阳即景

长江万里白如练，淮山数点青如淀。江帆几片疾如箭，山泉千尺飞如电。晚云都变露，新月初学扇，塞鸿一字来如线。

Zhou Deqing (1277-1365)

Ĉe Xunyang-rivero

—laŭ melodio *Aŭtuna sovaĝansero super landlimo*

Kiel rubando silka la rivero
ruliĝas mil kaj mil da lioj al la foro,
punktetoj kelkaj de la montoj
trans suda bordo svagas en indigkoloro.
Rapide glitas kelkaj velboatoj kiel sagoj,
akvfalo plonĝas fulme de altaĵ' kun roro.
Vesperaj nuboj transformiĝas en roserojn,
Krescenta luno lernas jen per luma molo
sterniĝi kiel ronda ventumilo.
Sovaĝanseroj flugas super la landlimo
en rekta vico kun streĉita kolo.

满庭芳

看岳王传

披文握武，建中兴宙宇，载青史图书。功成却被权臣妒，正落奸谋。闪杀人望旌节中原士夫，误杀人弃丘陵南渡銮舆。钱塘路，愁风怨雨，长是洒西湖。

Ĉe la tombo de Yue Fei

—laŭ melodio *Korto plena de aromo*

Tre lerta en verkad' kaj militarto,
li penis rekonstrui famon de la imperio
kaj lasis sian nomon en la historio.
Pro enviado de perfidelulo
li mortigitis antaŭ ol triumfi por nacio.
Rezulte l' Centra Ebenaj' ne reprenitis
kaj la popol' suferis do en agonio.
La reĝ' rifuĝis suden, forlasante
prapatran maŭzoleon jen en tragedio.
Sur la voj' de Qiantang*
la vento blovas triste kaj pluvstrio

ĉagrena super l' Okcidenta Lago

flirt-falas nun kun simpatio.

**En nuna Hangzhou de Zhejiang-provinco, Ĉinio.*

折桂令

倚蓬窗无语嗟呀，七件儿全无，做什么人家？柴似灵芝，油如甘露，米若丹砂。酱瓮儿恰才罄撒，盐瓶儿又告消乏。茶也无多，醋也无多。七件事儿尚且艰难，怎生教我折桂攀花！

—laŭ melodio *Pluki laŭrajn branĉojn*

Apogante min al la fenestro

mi suspiras senparola.

Sen la sep vivnecesaĵoj*

kiel povus teni mi la hejmon senangora?

La hejt lign' similas la trezoron en la monto,

La ole' la rosojn de l' donac' ĉielfavora,

rizo karas kiel perloj en la maro.

Kiam tuj malplenas saŭco-poto riĉkolora,

la saluj' entenas ja neniom.

Teo malmultiĝas je bezono plora

kaj vinagro preskaŭ venas al la fino.

Mi apenaŭ povas jen pro temp' strangola

la sepopon nun aĉeti, kian bonhumoron

povus havi mi por pluki florojn kun la sent' elkora?

**La sep vivnecesaĵoj estas oleo, salo, hejt ligno, rizo, saŭco, vinagro kaj teo.*

班惟志（约 1330 在世）

一枝花

秋夜闻筝

（一）透疏帘风摇杨柳阴，泻长空月转梧桐影。冷雕盘香销金兽火，咽铜龙漏滴玉壶冰。何处银筝？声嘹呖云霄应，逐轻风过短棂。耳才闻天上仙乐，身疑在人间胜境。

（二）梁州

恰便似溅石窟寒泉乱涌，集瑶台鸾凤和鸣，走金盘乱撒骊珠迸。嘶风骏偃，潜沼鱼惊。天边雁落，树梢云停。早则是字样分明，更那堪音律关情！凄凉比汉昭君塞上琵琶，清韵如王子乔风前玉笙，悠扬似张君瑞月下琴声。再听，愈惊。叮咛一曲《阳关令》，感离愁，动别兴。万事萦怀百样增，一洗尘清。

（三）尾

她那里轻笼纤指冰弦应，俺这里谩写花笺锦字迎，越感起文园少年病。是谁家玉卿，只恁般可憎，唤的人一枕胡蝶梦儿醒！

Ban Weizhi (vivanta ĉ. 1330)

Aŭdiĝas ĝeng*-ludado en aŭtuna nokto

—laŭ melodio *Branĉo da floroj*

1.

Tra l' fenestro brizo skuas kun leĝero

l' ombron de salikaj arboj.
Ronda luno ĵetas lumon el ĉielo
kaj la ombron de la platanarboj sur la teron.
La incenso en ĉizita ora la telero
jam finbrulis kaj malvarmis.
Gutas akvo el la bronza drak' en gelo,
la klepsidr' el jad' jam glaciĝis.
Jen, el kie ŝvebas ĝeng-muziko en ventpelo?
Ĝi sonoras laŭte kaj la nuboj eĥas,
per malpeza biz' penetras tra fenestro kun ŝancelo.
Mi apenaŭ aŭdis la muzikon fean el la blua volbo,
kiam ŝajne trovas mi min en fe-lando de l' etero.
**Ĝeng: ĉina citro*

2. —laŭ melodio *Kanto pri batalkampo*
Ĝi ja sonas kiel font' ŝprucanta akvon sur ŝtonpecojn,
kiel la feniksoj kantas sur la lun' kun trilo,
kiel perloj disĵetitaj tintas sur telero el la oro.
Ĝi panikas la stalonon galopantan en la vent-facilo
kaj surprizas fiŝojn la naĝantajn en la lago.
Ĝi haltigas la flugadon de sovaĝanseroj en defilo,
kaj ŝvebantajn nubojn stopas sur arbpintoj.
Dekomence l' vortojn mi aŭskultas kun trankvilo,
sed mi ne toleras la korŝian melodion!
Ĝia tono tiel tristas kiel lamentado de princino,
tiom klaras kiom la liuto jada sub la plektra vibro,
tiom melodias kiom sub lunlumo flutludado en fascino.
Se aŭskulti atenteme, vi tutcerte miras:
la muziko 'stas ario pri disiĝo de gehomoj kun intimo.
Vi ekhavas senton de ĉagreno, kiam vi persone
vidas, ke li ĝisrevidas por foriri al la malproksimo.
Ĉio en la kor' kaŝita en ĉi-hor' fariĝas ve-suspiro,
de la nuno jam la polvo forlavitas en vi el l' animo.

3. —laŭ melodio *Epilogo*
Ŝiaj mincaj fingroj tuŝas la glaciajn kordojn,
al ŝi skribi versojn volas mi sur florumita la papero.
Tio vekas ĉe mi emon versi en juneco.
Kiu estas tiel ludantin' de ĝeng-o sur la tero?
Kiel ŝi aminda estas! Ŝia melodio
min kondukas al la papilia songosfero!

汪元亨（? —?）

醉太平

警世

憎苍蝇竞血，恶黑蚁争穴。急流中勇退是豪杰，不因循苟且。叹乌衣一旦非王谢，怕青山两岸分吴越，厌红尘万丈混龙蛇。老先生去也。

Wang Yuanheng (? —?)

Mia averta

—laŭ melodio *Ebria en paca tempo*

Mi malamas, ke konkure muŝoj sučas sangon,
kaj ke la formikoj nigraj bataladas por la nesto.

La bravuloj sin retiras fronte al rapida tajdo
kaj ne laŭ rutin' vegetas dum viv-resto.

Mi lamentas, ke se l' altranguloj perdos la potencon
ili timos, ke la regno dividiĝos pro milit-tempesto.

Mi malŝatas, ke miksiĝas drakoj kun serpentoj en socio.

Kiel kadukulo, mi forlasos ilin, ne plu por kunesto.

朝天子

归隐

荣华梦一场，功名纸半张，是非海波千丈。马啼踏碎禁街霜，听几度头鸡唱。尘土衣冠，江湖心量，出皇家麟凤网。慕夷齐首阳，叹韩彭未央，早纳纸风魔状。

Ermitiĝo

—laŭ melodio *Kanto pri l' filo de l' Ĉielo*

Nura sonĝo estas la riĉec' kaj gloro,
fam' kaj rang' skribiĝas sur paper' ŝirita,
pravo kaj malprav' tumultas jen en mar' kun rovo.

Mia ekv' trot-rompis prujnon sur la reĝa vojo
multmultfoje en kokerikado frumatena tuj ĉe aŭroro.
Ĉiuj miaj roboj, kronoj polvkovriĝas por la rangaltiĝo,
kvankam ambicia, en diversaj lokoj por ofic-laboro,
mi ĉiame falas en la reton de la reĝa promocio.

Mi nun volas ermitiĝi apud verda monto en la foro.

Lamentindas por herooj mortigitaj en palac' la reĝa.

Mi preferas ja rezigni kaj ŝajnigi frenezeta min sen volo.

沉醉东风

归田

远城市人稠物穰，近村居水色山光。熏陶成野叟情，铲削去时官样，演习会牧歌樵唱。老瓦盆边醉几场，不撞入天罗地网。

Reveno al mia kampo

—laŭ melodio *Ebria en orienta vento*

Mi preferas vivi de homplena, brua urbo
kaj rezidi ĉe pitorekej' de montoj kaj rivero.
Mi kultivas min kiel sovaĝul' kun grizaj haroj,
kaj forigas pozon de la oficialulo, ne plu sen fiero.
Mi imitas paŝtiston kaj hakiston en kantado
kaj min ebrigas dum la tuta tago sur la tero
apud la argil-farita vazo de alkoholaĵo,
por eskapi la kaptilon de la reĝa citadelo.

倪瓚 (1301–1374)

人月圆

惊回一枕当年梦，渔唱起南津。画屏云嶂，池塘春草，无限消魂。旧家应在，梧桐覆井，杨柳藏门。闲身空老，孤篷听雨，灯火江村。

Ni Zan (1301-1374)

—laŭ melodio *Rondiĝo de luno kaj homoj*
Surprizite mi vekigās el la sonĝo
pri fiŝado sur la suda bordo de l' rivero.
Mi jen vidas ekraneskaj montoj en la nuboj,
kaj lageton kun junverdaj herboj kiel la bordero.
Kiel ĝojekscita sceno!
La malnova dom' ankoraŭ devas 'sti kun belo:
La folioj de platan' ombrumas super puto,
salikvergoj kaŝas mian pordon en malhelo.
Mi jam maljuniĝas pro klopodoj vanaj.
Nure mi aŭskultas al pluvado ĉe vespero
kaj rigardas la flagrantajn lampolumojn
en vilaĝo sur la borda sfero.

小桃红

秋江

一江秋水澹寒烟，水影如练，眼底离愁数行雁。雪晴天，绿苹红蓼参差见。吴歌荡桨，一声哀怨，惊起白鸥眠。

Rivero en aŭtuno

—laŭ melodio *Ruĝa persikfloro*
Sur aŭtuna la river' leviĝas frida brumo pala,
bildoj en la akvo klaras kristalpure.
Vico da sovaĝanseroj sur ĉiel' malklara
al mi ja sentigas la ĉagrenon.
En serena la ĉiel' post neĝ' vuala
ruĝaj lemnoj kaj helverdaj fagopiroj
jen miksite vidiĝas en vidkamp' senbara.
Boatisto remas zumkantante sur rivero.

Blankaj mevoj jen vekiĝas pro paniko
de suspiro lia longa, knara.

凭阑人

赠吴国良

客有吴郎吹洞箫，明月沉江春雾晓。湘灵不可招，水云中环佩摇。

Al amiko

—laŭ melodio *Homo sin apoganta al balustrado*

Amiko mia lertas en blovad' de flut',
ĝi povus la plenlunon brilan jen per sia lud'
altiris soben al river' de primavero
volvita per nebul' matena kun palhelo.
Kial allogi ĝi ne provus
la fean belulinon al la tero?
En nuboj kaj en akv' vi povus
aŭskulti tintojn de pendaĵoj jadaj en mistero.

水仙子

东风花外小红楼，南浦山横眉黛愁。春寒不管花枝瘦，无情水自流。檐间燕语娇柔，惊回幽梦，难寻旧游，落日帘钩。

—laŭ melodio *Kanto pri narciso*

L' orienta vento blovas
florojn ekster ŝia buduaro,
Mont' en sudo baras vidon
al ŝi kun ĉagren' en la brovaro.
Frida primaver' ne zorgas
pri malgrasaj floroj en malfalo,
senkompata akvo fluas foren.
Kveras sub l' aler' hirunda paro.
Vekiĝinte el la dolĉa songo,
ŝi ne trovas plu kun jovialo
sian karan koramikon en sunlumo
subiranta ĉe la hokoj de litovualo.

刘庭信（? —?）

折桂令

忆别

想人生最苦离别，唱到阳关，休唱三叠。急煎煎抹泪揉眵，意迟迟揉腮揽耳，呆答孩闭藏舌。随儿分儿你心里记着，病儿痛儿我身上添些，家儿活儿既是抛撇，书儿信儿是必休绝，花儿草儿打听得风声，车儿马儿我亲自来也！

Liu Tingxin (? — ?)

Rememoro pri disiĝo

—laŭ melodio Pluki laŭrajn branĉojn
Dum la viv' disiĝo estas plej amara.
Kiam oni kantas kanton de disiĝo,
ne ripetu ĝin trifoje per treniĝ' tonala.
Maltrankvila mi deviŝis larmojn tiu-hore,
gratis mi la vangojn kaj metonon konfuzite,
fermis buŝon, ŝlisis langon mi stupore.
Mian amon tenu firme vi en via kor',
mi eltenu mem malsanon sur la korpo.
Hejmajn aferojn vi neniom zorgu kun fervor',
tamen ne forgesu skribi al mi jen foj-foje.
Se mi scios pri amligo via al alia flor',
mi veturos per ĉevalo aŭ kaleŝ' al vi survoje.

水仙子

相思

恨重叠，重叠恨，恨绵绵，恨满晚妆楼；愁积聚，积聚愁，愁切切，愁斟碧玉瓯；懒梳妆，梳妆懒，懒设设，懒薰黄金兽。泪珠弹，弹珠泪，泪汪汪，汪汪不住流；病身躯，身躯病，病恹恹，病在我心头。花见我，我见花，花应憔悴；月对咱，咱对月，月更害羞；与天说，说与天，天也还愁。

Amsopiremo

—laŭ melodio *Kanto pri narciso*
Ĉagreno plus ĉagreno
turmentas min per ĝeno.
Amara ploro mia
ja plenas en la buduaro ĉe l' vespero elegia.
Aflikt' pliiĝas tag' post tago,
min mordas ĝi per atako.
Malĝojo en ĉagreno
drinkigas min per tas' smeralda da spleno.
Malemas tualeti mi sen volo
tuttage kun langvoro.
Mi pigras ĝuste en okazo
bruligi incensilojn en la bronza vazo.
Faligas mi larmperlojn jen senĉese,
larmeroj fluas jam ekscese.
Larmeroj ŝprucas multe kaj rapide,
ne ĉesas, daŭre fluas jen senbride.
Malsan' min trafas vere,
Suferis mi de morb' mizere.
Malviglas mi en ĉiu horo,

ĉar loĝas ĝi en mia koro.
Rigardas mi al floro,
ŝi gapas al mi en stuporo,
ŝi ankaŭ magras kun doloro.
Vizaĝas mi al la plenlun'
kaj l' lun' rigardas min tra brum',
ŝi sentas pli da honto nun.
Demandas mi al la ĉielo,
respondon mi ne aŭdas per orelo,
ŝi ankaŭ jen ĉagrenas en malhelo.

一枝花

春日送别

丝丝杨柳风，点点梨花雨。雨随花瓣落，风趁柳条疏。春事成虚，无奈春归去。春归何太速，试问东君，谁肯与莺花做主？

Adiaŭado en printempa tago

—laŭ melodio *Branĉo da floroj*

Salikvergoj mincaj svingiĝas en vento,
la pirfloroj floras sub pluvguta bato.
Pluvo kaj petaloj falas kun leĝero,
flirtas vent' kun salikflokoj super pado.
La printemp' jam pasis en vakuon,
ĉu mi povus ĝin reteni laŭ la ŝato?
Kial ĝi reiris tiom haste foren?
Mi demandas al l' Eosta Sukavato:
kiu povus zorgi birdojn, floroj kun kompatato?

汤式 (? — ?)

小梁州

九日渡江

(一) 秋风江上棹孤舟，烟水悠悠，伤心无句赋登楼。山容瘦，老树替人愁。樽前醉把茱萸嗅，问相知几个白头。乐可酬，人非旧。黄花时候，难比旧风流。

(二) 秋风江上棹孤航，烟水茫茫。白云西去雁南翔。推蓬望，清思满沧浪。东篱载酒陶元亮，等闲间过了重阳。自感伤，何情况。黄花惆怅，空做去年香。

Tang Shi (? — ?)

Transpasi l' riveron en la Montgrimpa Tago

—laŭ melodio *Kanteto pri batalkampo*

1.

Mi remas la solacan boateton en aŭtun-zefiro,
kvieta fluas nun nebulkovrita la rivero.
Sur alta turo mi ne povas versi kun korŝiro,
la mont' aspektas pli malgrasa,

maljunaj arboj veas kiel mi jen kun suspiro.
Ebria kun vintas' mi flaras kornusflorojn,
ĉuante, kiom da amikoj jam griziĝas en senilo.
Mi povas serĉi ĝojon en ajna tempo,
sed jam amikoj estas ne plu la antaŭaj kun spirita brilo.
La flavaj floroj pompas nun denove,
kiu el ili povus kun mi ĝui florojn kun admiro?

2.

Boat' soleca mia velas en aŭtuna vento,
sub la nebulvual' trankvile fluas la rivero.
Sovaĝanseroj flugas okcidenten, nuboj suden.
Malfermis mi fenestron de l' boat' en akvopelo,
la ondoj jen tumultas kun internaj sentoj miaj.
Mi drinkas kiel la ermito* apud heĝo antaŭ la loĝ-ĉelo,
sencie mi pasigis jam la tempon de l' Montgrimpa Tago.
Ĉagrena mi nun afliktiĝas kun despero,
velkiĝis jam la flavaj floroj en malvigla stato,
elspiris bonodoron lastajare ili vane jen kun sinofero.

**Tie ĉi "la ermito" aludas al poeto Tao Yuanming (352 aŭ 365-427).*

天引香

忆维扬

羨江都自古神州，天上人間，楚尾吳頭。十萬家畫棟朱帘，百數曲紅橋綠沼，三千里錦纜龍舟。
柳招搖，花掩映，春風紫驄；玉玳瑁，珠絡索，夜月香兜。歌舞都休，光景難留。富貴隨落日西
沉，繁華逐漸逝水東流。

Rememoro pri Yangzhou

—laŭ melodio *Kanto de ĉiela aromo*

Indas laŭdi la ĉefurbon ĉe l' rivero!
Ĝi ja estas paradizo en la homa mondo
kun la riverfinoj suda kaj eosta en pejzaĝa belo.
Staras dekmil domoj kun pentritaj traboj
kaj kurtenoj perlaj, jen cent pontoj en apero
arkas kaj serpentas drakboatoj tri mil liojn.
Meze de la ruĝaj floroj en prospero,
inter salikarboj svingiĝantaj en zefiro,
la ĉevaloj violaj galopetas en ventriĉa primavero.
La pendaĵoj jadaj tintas, orelingoj brilas,
bonodoro ŝvebas ĉien en lunhelo.
Nek dancado nek kantad' en ombro sin prezentas,
Ja neniu povas tenas la spektaklon viva sur la tero.
Imponeco kaj luksec' jam sinkis kune kun la suno,
splendo akve fluas orienten en libero.

兰楚芳（? — ?）

四块玉

风情

（一）意思儿真，心肠儿顺。只争个口角头不囫圇，怕人知，羞人说，嗔人问。不见后又嗔，得见后又忖，多敢死后肯。

（二）我事事村，他般般丑。丑则丑村则村意相投，则为他丑心儿真，博得我村情儿厚。似这般丑眷属，村配偶，只除天上有。

Lan Chufang (? — ?)

Amemaj vortoj

—laŭ melodio *Kvar pecoj da jado*

1.

Lia amo 'stas sincera,

lia kor' malkaŝa.

Mi nur volas, ke li montras sin fidela.

Timas mi, ke oni konas nian amon,

hontas mi, ke oni klaĉas pri ni,

mi malŝatas, ke nin oni ĵetas en disfamon.

Kiam mi ne vidas lin, mi lin ĉikanas;

Kiam mi lin vidas, mia penso vagas.

Mi ja ĝis la mort' lin ĉiam amas.

2.

Mi en aferoj ĉiuj stultas,

dum li malbelas ja en ĉiuj flankoj.

Spite al malbeleco kaj stulteco

la amo daŭras inter ni sen mankoj.

Mi korinklinas al malbela lia,

lin kaptas mia sent' profunda.

la paro stulta kaj malbela kiel nia,

ekzistas ne en la vulgara mondo,

sed nur troviĝas en ĉiela rondo.

钟嗣成（约 1279—约 1360）

醉太平

落魄

（一）绕前街后街，进大院深宅。怕有那慈悲好善小裙钗，请乞儿一顿饱斋，与乞儿绣副合欢带，与乞儿换副新铺盖，将乞儿携手上阳台，救贫咱波奶奶！

（二）风流贫最好，村沙富难交。拾灰泥补砌了旧砖窑，开一个教乞儿市学。裹一项半新不旧乌纱帽，穿一领半长不短黄麻罩，系一条半联不断皂环绦，做一个穷风月训导。

Zhong Sicheng (? — ?)

Almozula instruito

—laŭ melodio *Ebria en la paca tempo*

Mi iras laŭ la strato,
de dom' al domo, min trenante pene.
Mi serĉas la almozdoneman junulinon,
kiu regalos min per manĝo zorgoplene,
kaj brodos por mi zonon per la desegnaĵo akacia,
donacos al mi novan litkovrilon ĝojmiene
kaj fine man-en-mane kuŝos en la lito.
Ho, kara avnjo, helpu min povrulon, kompreneme!

2.

Mi vivu amoplene en malriĉ' prefere,
la riĉa kaj krudema malfacilas 'sti amiko.
Malnovan la brikejon mi riparos kunespere,
ke ĝi fariĝu la lernejo por almozulidoj.
Mi portos nigran ĉapon duon-novan ja fiere
kaj duon-longan flavan robon el kanabo
kun la disrompiĝema nigra zon' el silko, kvazaŭ klere,
por ilin instruadi kiel ĝui vivon ja leĝere.

钱霖 (? — ?)

哨遍

看钱奴

(一) 试把贤愚穷究，看钱奴自古呼铜臭。徇己苦贪求，待不教泉货周流。忍包羞，油铛插手，血海舒拳，肯落他人后？晓夜寻思机彀，缘情钩距，巧取旁搜。蝇头场上苦驱驰，马足尘中厮追逐，积攒下无厌就。舍死忘生，出乖弄丑。

(二) 耍孩儿

安贫知足神明佑，好聚敛多招悔尤。王戎遗下旧牙筹，夜连明计算无休。不思日月搬乌兔，只与儿孙作马牛。添消瘦，不调裊鼎，恣逞戈矛。

(三) [十煞]

渐消磨双脸春，已雕镌两鬓秋。终朝不乐眉长皱，恨不得柜头钱五分息招人借，上相一周年不放赎。狠毒性如狼狗，把平人骨肉，做自己膏油。

(四) [九煞]

有心待拜五侯，教人唤甚半州。忍饥寒攒得家私厚。待垒做钱山儿倩军士喝号提铃守，怕化做钱儿请法官行罡布气留。半炊儿八遍把牙关叩，只愿得无支有管，少出多收。

(五) [八煞]

亏心事尽意为，不义财尽力掙，那里问亲兄弟亲姊妹亲姑舅。只待要春风金谷骄王恺，一任教夜雨新丰困马周。无亲旧，只知敬明眸皓齿，不想共肥马轻裘。

(六) [七煞]

资生利转多，贪婪意不休，为锱铢舍命寻争斗。田连阡陌心犹窄，架插诗书眼不瞅。也学采东篱菊，子是个装呵元亮，豹子浮丘。

(七) [六煞]

恨不得扬子江变做酒，枣穰金积到斗。为几文贖背钱受了些旁人咒，一斗粟与亲眷分了颜面，二斤麻把相知结下寇仇。真纒缪，一味的骄而且吝，甚的是乐以忘忧。

(八) [五煞]

这财曾燃了董卓脐，曾梟了元载头，聚而不散遭殃咎。怕不是堆金积玉连城富，眨眼早野草闲花满地愁，干生受。生财有道，受用无由。

(九) [四煞]

有一日大小运并在命宫，死囚限缠在卯酉甚的散得疾子为你聚来得骤。恰待调和新曲歌金帐，逼临得佳人坠玉楼。难收救，一壁厢投河奔井，一壁厢烂额焦头。

(十) [三煞]

窗格每都颯颯的飞，椅桌每都出出的走，金金钱米都消为尘垢。山魃木客相呼唤，寡宿孤辰厮趁逐喧白昼，花月妖将家人狐媚，虚耗鬼把仓库潜偷。

(十一) [二煞]

恼天公降下灾，犯官刑系在囚，他用钱时难参透。待买他上木驴钉子轻轻钉，吊脊筋钩儿浅浅钩。便用杀难宽宥，魂飞荡荡，魄散悠悠。

(十二) [尾]

出落他平生聚敛的情，都写做临刑犯罪由。将他死骨头告示向通衢里磔，任他日炙风吹慢慢朽。

Qian Lin (? — ?)

Avarulo

—laŭ melodio *Fajfado ĉirkaŭe*

1.

Esploru mi saĝecon kaj stultecon.
De antikvec' avarulo malodoras jen je oro.
Li por si ĉasas la riĉaĵojn pene,
kvazaŭ li volus bridi cirkuladon de la mon-trezoro.
Neniam li sin sentas honta per man' eligi
monerojn el kaldrono kun ole' en bolo
aŭ el la sanga maro spite ĉion,
volante ne postiĝi por akiri monon kun fervoro.
Tagnokte li cerbumas artifikaĵojn
por vringi monon ĉiamaniere sen langvoro,
ĉu per ruzemo, ĉu per forto.
Li provas eĉ apreci kun adoro
muŝ-grandajn bonojn kaj polvojn da profito.
Li penas akumuli monon kun nesatigebla koro,
riskante sian vivon, forgesante sian morton.
Finfine li finiĝos per skandal' de malhonoro.

2. —laŭ melodio *Inciteto al infano*

Protektas tiujn kontentantajn pri povreco la Ĉielo,
al tiuj riĉaĵo-akumulantaj venas afliktiĝo.
Saĝulo havis la ĵetonojn el eburo, kun sinofero,
kalkulis ilin de mateno ĝis vespero,
spite al alternado de la suno kaj la luno.

Li penis kiel bov' por siaj filoj, nepoj kun prefero.
Pli kaj pli li magriĝas ne zorgante pri manĝado
kaj vestoj, sed nur pri riĉaĵoj al prospero.

3. —laŭ melodio *La naŭa strofo antaŭ la lasta*
Sur la vizaĝo fadas la kolor' de primavero,
aŭtuna frostoj farbas liajn harojn grize.
Tuttage liaj brovoj kuntiriĝas en malhelo,
li volus, ke li pruntu monon je kvindek-percenta
la interezo, kaj la lombardaĵojn en la ĉelo
oni ja ne elaĉetu dum la tuta jaro.
Li estas lupoj aŭ ŝakalo kun kruelo,
premante ostojn de aliaj en pecetojn
por pli grasigi sian kukon per butero.

4. —laŭ melodio *La oka strofo antaŭ la lasta*
Li avidas je l' titolo de markizo,
kvankam li nomiĝas "riĉa pli ol duon-regno".
Li eltenas frostojn kaj malsaton for de rizo,
tiel ke konstruas monton da riĉaĵoj li kun peno.
Por defendi ĝin li dungas stargardistojn ĉe la pordo.
Do, timante, ke la mono-drako flugas for sen spuro,
li invitas taŭlist-pastron ĵongli en la korto
per magio por ĝin teni en sekuro.
Kunpremante dentojn pro tio,
li esperas havi ja enspezojn ol elspezojn kun konscio.

5. —laŭ melodio *La sepa strofo antaŭ la lasta*
Li faras ĉion riproĉindan
kaj alproprigas la riĉaĵojn al si pene
ĉu de gefratoj, ĉu de onkloj kaj onklinoj.
Li volas l' or-magnaton superriĉi plene,
sed la klerulojn povrajn jen ignoras tute.
Li havas nek amikojn nek parencojn ĉe si meme,
li amas nur belinojn kun okuloj brilaj, blankaj dentoj,
li volas kundividi kun neniuj
peltaĵojn kaj kaleŝojn siajn volonteme.

6. —laŭ melodio *La sesa strofo antaŭ la lasta*
Ju pli da profito li akiras,
des pli li deziron kovas kun avida koro.
Li eĉ riskas sian vivon por la poka mono,
kvankam li jam havas multajn kampojn de valoro.
Li ne ĵetas ekrigardon al la plenŝarĝita librobreto,

sed li volas sin ŝajnigi kun adoro
al poet' Tao*, kiu ĝuis krizantemojn ĉe la heĝo.
Fakte li ferocas kiel leopardo de hororo.

**Tao aludas Tao Qian (352-427), kiu estas la unua pasterala poeto. Dum sia juneco li oficis kiel malaltrungulo.
Pro malalta deveno li ofte renkontis malestimon, tiel ke li decidis iri al ruro kaj vivi ermite.*

7. —laŭ melodio *La kvina strofo antaŭ la lasta*
Li dezirus turni en alkoholaĵon l' akvon de rivero,
akumuli la jujubkoloran oron ĝis altec' de monto.
Oni lin insultas pro pruntreno sia sub deviga pelo,
por buŝelo da mili' li rompas kun parenco,
por kanaba fask' li igas onin naĝi en sufero.
Kia absurdaĵo!
Li ĉiame arogantas kaj sin tenas kun fiero,
fine li fariĝas, kvankam ĝoja, trista sen libero!

8. —laŭ melodio *La kvara strofo antaŭ la lasta*
Fortuno iam kaŭzis glavmortigon de la kortegano,
kaj ankaŭ la pereon de l' ministro kun kateno,
la monto ora, se ne dividita, jen alportas katastrofon.
Eĉ li riĉiĝus kun monteg' da or' kaj jado sur urb-tereno,
tre baldaŭ kreskus herboj kaj sovaĝaj floroj de ĉagreno.
Ha, ĉia peno akumuli monon estos vana!
Li certe afliktiĝos ja pro granda spleno,
ĉar li ne povos ĝui la riĉaĵojn eĉ kun oro-pleno.

9. —laŭ melodio *La tria strofo antaŭ la lasta*
Iutage kiam la malbona ŝanco falos,
li aliros al fatalo laŭ destino.
La riĉaĵoj kunigitaj malaperos pli rapide
ol li ilin staplas ĝis kulmino.
Iam kiam la belino kantos en la ora tendo,
ŝi abrupte saltos de la alta turo al la viva fino.
Kia katastrofo!
Unuflanke inoj plonĝos en la puton kun kapklino,
aliflanke virojn ĝenos pro la riĉaĵ-halucino.

10. —laŭ melodio *La dua strofo antaŭ la lasta*
Tra l' fenestro ĉio flugos for,
seĝoj, tabloj forportiĝos en ventego,
reduktiĝos al polvoj riz', arĝent' kaj or'.
Monstroj el arbar' kaj monto hurlos laŭte,
orfaj kaj solecaj steloj restos kun li en izol'.
Bruo regos dum taglumo.

La spiritoj floraj sorĉos homojn per dolor',
la fantomoj ŝtelos la grenejon sen langvor'.

11. —laŭ melodio *La antaŭlasta strofo*
Katastrofo falas kolereme el ĉielo;
malfacilas por li jen per mon' elaĉeti
por eviti la malliberiĝon en karcero.
Pune alnajlota al azeno ligna, li petegas
vane mateladi najlojn kun leĝero,
kaj malpeze lin pendigi per la hoko.
Li ne povas esti indulgata sen severo.
Ve, animo lia flugas foren
kaj spirito lia forpeliĝas en etero.

12. —laŭ melodio *Epilogo*
Riĉaĵoj liaj kolektitaj dum la tuta vivo
jen eksponataj en publiko
atestas liajn pekojn nesaveblajn.
Kadavro lia elmetitas sen repliko
sub la ĉielo por rigardo,
kaj sunbakatas kaj putriĝas en ventpiko.

孙周卿（约 1320 在世）

蟾宫曲

山居自乐

草团标正对山凹，山竹炊粳，山水煎茶。山芋山薯，山葱山韭，山果山花。山溜响冰敲月牙，扫山云惊散林鸦。山色元佳，山景堪夸，山外晴霞，山下人家。

Sun Zhouqing (vivanta ĉ. 1320)

Plezuero en la monta vivo

—laŭ melodio *Ario de Luna Palaco*

Mia ronda pajlkaban' rigardas al la valo.
Mi kuiras rizon per bambuo monta,
kaj infuzi teon per fontakv' sub herb-vualo.
Mi batatojn, tarojn, cepojn, fruktojn manĝas,
kaj mi ĝuas florojn ĉie en arbaro.
Mi aŭskultas al kreviĝo de glacio sub la luno;
monta brizo forbalaas nubojn en blankpalo
kaj panikas korvojn flugi el arbbranĉoj.
La pejzaĝo monta ĉarmas sen komparo
kaj allogas ĝia bril-koloro de smeraldo.
Trans la monto ŝvebas la iriza nubomaro;
sube de la mont' kabanoj nestas ja en aro.

曹德 (? — ?)

庆东原

江头即事

低茅舍，卖酒家，客来旋把朱帘挂。长天落霞，方池睡鸭，老树昏鸦。几句杜陵诗，一幅王维画。

Cao De (? — ?)

Ĉe riverbordo

—laŭ melodio *Benita orienta ebenajo*

Meze de malaltaj pajlkabanoj

staras vin-vendej' kun ŝildo tola.

Kiam gasto venas,

jen levitas ĝia pordkuteno ruĝkolora.

En ĉielo vasta etendiĝas la krepuskaj nuboj,

ĉe l' laget' kvadrata la anasoj kuŝas jen en dorm' langvora;

ĉirkaŭ la maljuna arbo ŝvebas korvoj are.

Ĝi similas vere al poemo senparola,

aŭ pentraj' kun pastoral' dekora.

真氏 (?—?)

解三醒

奴本是明珠擎掌，怎生的流落平康？对人前乔做作娇模样，背地里泪千行。三春南国怜飘荡，一事东风没主张，添悲怆，那里有珍珠十斛，来赎云娘！

Zhen Shi (?—?)

—laŭ melodio *Trifojaj ebriiĝoj kaj sobriĝoj*

Mi estis perlo en manplato de gepatroj,

sed jam reduktiĝis al putino de bordelo.

Virojn plezurigi devas mi per mia belo,

kaŝe mi post ilia dors' faligas larmojn.

Tri printempojn vagas mi sur suda tero,

senrimedas mi sub la vipado de l'orienta vento.

Kian ĝenon mi kovas kun korsufero!

Kiu povus per abund' da perloj

liberigi min elacete el mizero?

吴西逸 (约 1320 在世)

天净沙

闲题

长江万里归帆，西风几度阳关，依旧红尘满眼。夕阳新雁，此情时拍阑干。

Wu Xiyi (vivanta ĉ. 1320)

Skribita dum libera tempo

—laŭ melodio *Pura sablo*

Revenas veloj sur mil-lio-longa la Jangzi-Rivero,

kiom da fojoj l' okcidenta vent' trapasis Sun-pasejon?
Ankoraŭ vidas mi la mondon de l' vulgara tero.
Sovaĝanseroj novaj gakas ĉe vesperkrepusko.
Fojfoje mi frapadas balustradon nur pro korsufero.

清江引

秋居

白雁乱飞秋似雪，清露生凉夜。扫却石边云，醉踏松根月。星斗满天人睡也。

Aŭtuna nokto

—laŭ melodio *Kanto pri klara rivero*

Sovaĝanseroj blankaj kiel neĝ' aŭtuna flugas en pelmelo;
rosoj jen estiĝas en malvarma nokto klara.
Ebria, mi surtretas pinradikojn en lunhelo
kaj pied-batas blankajn nubojn de sur ŝtonoj.
Mi kuŝe dormas sub stelbrila la ĉielo.

寿阳曲

四时

紫心事，惹恨词，更那堪动人秋思。画楼边几声新雁儿，不传书摆成个愁字。

Kvar sezonoj (aŭtuno)

—laŭ melodio *Kanto pri longviva suno*

Ĉagren' nestanta en la koro
ne povas esprimiĝi jen per vortoj,
l' aŭtuno eĉ plu tristigas kun doloro.
Sovaĝanseroj kelkaj gakas super la pentrita domo,
ne alportante la leteron, sed pli da rankoro.

程景初 (? — ?)

醉太平

恨绵绵深宫怨女，情默默梦断羊车，冷清清长门寂寞长青芜，日迟迟春风院宇。泪漫漫介破琅玕玉，闷淹淹散心出户闲凝伫，昏惨惨晚烟妆点雪模糊，浙零零洒梨花暮雨。

Cheng Jingchu (?— ?)

—laŭ melodio *Ebria en orienta vento*

En palac' profunda l' junulino kun ĉagreno
sonĝas en silento pri alven' de reĝa ĉaro ŝaf-tirita.
Antaŭ la Pordego kreskas herboj kun tristpleno;
sub sinkanta suno la printempa vent' en korto blovas.
Dura jad' eĉ difektiĝas pro gutad' de ŝia larmoĉeno,
morna ŝi eliras kaj promenas sur la pad' sencele,
rigardante foren staras ŝi longlonge kun enkora spleno.
En nebulo neĝa la kuirita fum' leviĝas soren,

en subtila pluv' petaloj de pirarbo falas en vespera sveno.

无名氏

水仙子

(一) 青山隐隐水茫茫，时节登高却异乡。孤城孤客孤舟上，铁石人也断肠，泪涟涟断送了秋光。黄花梦，一夜香，过了重阳。

(二) 夕阳西下水东流，一事无成两鬓秋。伤心人比黄花瘦，怯重阳九月九，强登临情思幽幽，望故国三千里，倚秋风十二楼，没来由惹起闲愁。

(三) 常记得离筵饮泣饯行时，折尽青青杨柳枝。欲拈斑管书心事，无那可乾坤天样般纸。意悬悬诉不尽相思，漫写下鸳鸯字，空吟就花月词，凭何人付与娇姿。

Anonimulo

—laŭ melodio *Kanto pri narciso*

1.

Verdaj montoj vualiĝas en nebulo,
fluas la river' senhalte ĝis la foro.
En la Tago Montgrampanta
mi troviĝas tamen aliloke en la solo.
Sur boat' soleca ĉe l' izola urbo
mia koro disŝiriĝus eĉ kun fera volo.
Pro larmeroj mi ne povas vidi la aŭtunan lumon.
Mia sonĝo plenas de la flavaj floroj
sed persistas unu nokton,
kaj la Tago jam forpasis sen favoro.

2.

Suno sinkas, la rivero fluas orienten laŭkutime,
sen meritoj mi ekhavas blankajn harojn ĉe tempio.
Mi magriĝas pli ol floro pro ĉagreno,
mi eĉ timas tiun Tagon pro la senta agonio,
ĉar sur monto devigite mi vagigos pensojn tristajn,
kaj rigardos mian naskolokon foran je mil lioj.
Mi apogas min al la parapeto sur dekdu-etaĝa turo,
mi nereteneble trovas min jen en melankolio.

3.

Ofte rememoras mi pri adiaŭa la festeno,
ke ni larmis, kiam mi derompis salikvergon
kiel la skribilon por elskribi l' koron kun ĝen-pleno,
sed ĉu trovi la paperon tiel grandan kiel la ĉielo?
Mi ne povus esprimi la senfinajn amon kun ĉagreno,
kaj mi skribis nur tri vortojn "birdoj de amo".
Vane mi recitis versojn pri la lun' kaj floroj jen en spleno.
Ĉu mi povus sendi l' amleteron al la karulin' kun ĝemo?

塞鸿秋

爱他时似爱初生月，喜他时似喜梅梢月，想他时道几首西江月，盼他时似盼辰钩月。当初意儿别，今日相抛撇，要相逢似水底捞明月。

—laŭ melodio *Aŭtuna sovaĝansero super landlimo*

Mia amo al li estis kiel lun' ĵus leviĝanta,
mia ŝato al li kiel ĝojo inter liaj brovoj.
Kiam mi sopiris al li, mi ariojn kantis;
kiam mi atendis lin, mi folis laŭ bontrovoj.
Tiam li inklinis al mi el la koro,
sed nun, kiel povus mi elteni forĵetadon lian?
Nia rekuniĝ' similas vere al ventblovoj.

塞鸿秋

山行警

东边路、西边路、南边路。五里铺、七里铺、十里铺。行一步、盼一步、懒一步。霎时间天也暮、日也暮、云也暮，斜阳满地铺，回首生烟雾。兀的不山无数、水无数、情无数。

Survoje en la monto

—laŭ melodio *Aŭtuna sovaĝansero super landlimo*

Sur orienta vojo, sur okcidenta vojo, sur suda vojo,
kvin liojn fora, kaj sep liojn fora, kaj dek liojn fora,
mi faras paŝojn jen vidante jen pigrante.
Subite iĝas la ĉielo krepusk-kolora,
la sun' kovriĝas de nebulo,
kaj nuboj dronas en malhel' senglora.
La lumo de sinkanta sun' sterniĝas sur la tero,
mi turnas mian kapon, vidas ĉirkaŭ mi en brumo.
Sennombraj montoj vualiĝas en malhelo,
sennombraj riverfluoĵ kaŝas sin en mont-brakumo,
kaj nedireblaj kor-ĉagrenoj nestas en korsfero.

梧叶儿

嘲荒人

东村里鸡生凤，南庄上马变牛。六月里裹皮裘。瓦垄上宜栽树，阳沟里好驾舟。瓮来大肉馒头，俺家的茄子大如斗。

Moko pri mensogulo

—laŭ melodio *Platanaj folioj*

En vilaĝo orienta naskas kok' fenikson.
En la orienta bov' fariĝas la ĉevalo.
En junio oni portas la peltaĵon kontraŭ frido.
La tegmento estas taŭga lok' por vegetalo.

En kloak' boato kuras glate.
Oni bakas panon kaj kuiras viandpecojn en la ĵaro.
Mia melongeno monte grandas sen komparo.

朝天子

志感

不读书有权，不识字有钱，不晓事倒有人夸荐。老天只恁忒心偏，贤和愚无分辨。折挫英雄，消磨良善，越聪明越运蹇。志高如鲁连，德过如闵骞，依本分只落的人轻贱。

Meditado

—laŭ melodio *Kanto pri filo de l' Ĉielo*

Tiuj, kiuj ne estas kleraj, tenas la potencon.
Tiuj, kiuj ne scipovas legi, vivas en prospero.
Tiuj, kiuj scias ja nenion, eĉ rikoltas laŭdojn.
Ĉu ne zorgas pri stulteco kaj saĝeco la Ĉielo?
Ĉu ĝi nur inklinas sin al tiuj maljustaĵoj?
Kial la heroojn ofte trafas la sufero?
Kial talentuloj trovas sin en forgesiteco?
Ju pli saĝas ili, des pli malbonsortas en mizero.
Eĉ se ili estas ambicia kaj bonvirta,
ili, kvankam devoscia, nur traktatas kiel bagatelo.

红绣鞋

赠妓

长江水流不尽心事，终条山隔不断情思。想着你，夜深沉，人静悄，自来时，来时节三两句话，去时节一篇词，记在你心窝儿里直到死。

Al kantistino

—laŭ melodio *Ruĝaj broditaj ŝuoj*

Ne forporti povas vian sopiremon la rivero,
nek la monto povas bari l' amon inter ni du.
Kiam pensas pri vi mi kun korsufero,
nokt' pli kaj pli profundigas
kaj silento regas en malhelo.
Kiam vi alvenis,
vi nur diris kelkajn vortojn ĉe l' orelo
Ĉe l' disiĝ' vi lasis al mi la poemon,
mi memoros ĝin ĝis mia morto kun fidelo.

小桃红

别忆

断肠人寄断肠词，词写心间事，事到头来不由自。自寻思，思量往日真诚志。志诚是有，有情谁似，似俺那人儿？

Rememoro pri disiĝo

—laŭ melodio *Ruĝa persikfloro*

Korŝira, skribas mi ĉagrenajn versojn,
kiuj elŝprucas vortojn el la koro.
Nereteneble faras tion mi jen kontraŭ volo.
Mi meditas pri ĉi tio kaj alio,
pri nia sincereco en pasinta la memoro.
Jes ja, li havas sincerecon tutaniman,
kiu similas al li, fidelema la sinjoro?

折桂令

微雪

朔风寒吹下银沙，蠹砌穿帘，拂柳惊鸦。轻若鹅毛，娇如柳絮，瘦似梨花。多应是怜贫困天教少洒，止不过庆丰年众与农家。数片琼葩，点缀槎丫。孟浩然容易寻梅，陶学士不够烹茶。

Neĝeto

—laŭ melodio *Pluki laŭrajn branĉojn*

La norda vent' malsupren blovas neĝon
kiel arĝentan sablon en leĝero.
Erodas ĝi la ŝtupojn, kie staras mi,
karezas inter salikarboj per tenero,
panikas korvojn en silento.
Malpeze kiel plum' ĝi flirtas en aero,
subtile kiel salikflok' ĝi ŝvebas,
kaj magras kiel la pirflor' ĝi kun etero.
Ĉiel' nur verŝas malabundon da ĝi
por montri kompatemon al povruloj en sufero,
kaj por promesi riĉrikolton jen al ili.
Malmulte da petaloj jadaj pendas en prospero,
nur ornamante branĉojn de la arboj.
Tiel facilas serĉi umeflorojn en neĝsfero
por la poet', sed ne sufiĉas por la instruito
infuzi teon per la poka neĝ' en gelo.

折桂令

叹世间多少痴人，多是忙人，少是闲人。酒色迷人，财气昏人，缠定活人。钹儿鼓儿终日送人，车儿马儿常时迎人。精细的瞒人。本分的饶人。不识时人，枉只为人。

—laŭ melodio *Pluki laŭrajn branĉojn*

Ve, kiom da stultuloj estas en la mondo?
Multe da ili okupiĝas pri laboro,
poke da ili faras ja nenion tutatage.
Kelkaj el ili konkeratas de l' volupt' kaj alkoholo,
aliaj je l' lukseco kaj riĉaĵ' avidas.

Sed la vivantaj destinatas al la morta horo.
Tamburoj kaj cimbaloj ofte bonvenigas la novulojn,
kaleŝoj kaj ĉevaloj sendas homojn al la tomb-soporo.
Ho, la sagacaj trompas homojn,
ho, la honestaj estas pardonemaj kun bonvolo.
Se vi ne konas, kiel vivi,
vi estas nur stultulo kun malmola kolo.

梧叶儿
贪

一夜千条计，百年万世心，火院有海来深。头枕着连城玉，脚踏着遍地金。有一日死来临，问贪公那一件儿替得您？

Avideco

—laŭ melodio *Platanaj folioj*
Tranokte vi elpensas artifikojn mil,
kaj planas vian onton de cent jaroj.
L' infera fajro brulas kontraŭ la dezir'.
Sub via kapo la kusen' valoras je onia mir',
sur kamp' de or' vi staras per piedoj viaj.
Sed kiam Morto vin vizitos iutage per alir',
Do, kio povus anstataŭi vin je via lasta spir'?

四换头

1. 相思

两叶眉头，怎锁相思万种愁。从他别后，无心挑绣。这般证候，天知道和天瘦。

2. 约情

东墙花月，好景良宵恁记者。低低的说，来时节，明日早些，不志诚随灯灭。

—laŭ melodio *Kvar ŝangoj de tonoj*

1. Amsopiro

Per brovoj mincaj kiel la folioj
mi ja ne povas ŝlosi mil ĉagrenojn de amosopiro.
Ekde disiĝo lia
mi jam ne emas brodi kun facilo.
Se la Ĉielo sciis, kia estas mia animstato,
ĝi certe dronus same kune kun mi en gracilo.

2. Rendevuo

“Inter floroj ĉe l' eosta muro sub lunhelo:
tenu tiun belan scenon en via memoro,”
flustras ŝi jen en orelo lia,
“Venu en pli frua horo
morgaŭ. Se vi dubas mian amon

vi foriru, kiel lampo estingiĝos, sen bonvolo.”

快活三过朝天子四换头

(一) 快活三

良辰美景换今古，赏心乐事暗乘除，人生四事岂能无？不可教轻辜负。

(二) 朝天子

唤取伴侣正好向西湖路，花前沉醉倒玉壶，香喻雾，红飞雨。九十韶华，人间客寓，把三分分数，一分是流水，二分是尘土，不觉的春将暮。

(三) 四换头

西园杖屦，望眼无穷恨有余，飘残香絮，歌残白纻，海棠花底鹧鸪，杨柳梢头杜宇，都唤取春归去。

1. —laŭ melodio *Ĝojoj tri*

Bona temp' kaj belaj scenoj

ŝanĝiĝemas kun vario,

Ĝojo kaj plezuro en la koro

pasos for ja sen konscio.

Ĉiu devas sperti vivon,

maljuniĝon, malsaniĝon, morton en la vic-linio,

ne vanigu ĉiun minuteton

kaj sekundon sen racio.

2. —laŭ melodio *Kanto pri l' filo de l' Ĉielo*

Mi invitas unu el amikoj iri

al la Okcidenta Lago en serena la vetero,

kaj drinkadas el vinkruĉo jada ĝis ebrio.

En nebul' aromo ŝvebas kun leĝero,

ruĝaj floroj pluve falas.

Se vi vivus ĝis la aĝ' de naŭdek jaroj sen sufero,

homa mondo servus kiel nur hotelo.

Se dividi l' vivon en tri partojn,

la triono pasas kune kun la fluoj de l' rivero,

du trionoj flugas for kun polvo,

sen konscio la printempo tuj finiĝos ĉe vespero.

3. —laŭ melodio *Kvar ŝanĝoj de tonoj*

En okcidenta kort', kun irbaston' enmane,

kun kor-ĉagren' mi gapas al la foro.

Aromo ŝvebis for kun salikflokaj,

la kantistino en lin-robo blanka lacas sen fervoro.

Sub begoni' perdrikoj jen rukulas,

kukoloj flugas super salikpintojn,

printempon ili adiaŭas kun petolo.